Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 20 — Trimonata

2/90

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

Teknika redaktisto: Stefan MacGill

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Barcsay Zsuzsa – *Motivado per ekzamenoj en lerneja Esperanto-instruado en Hungario* 1
Shao Rong (Soliva) – *Kial kaj kiel enkonduki en la Esperanto-kurson?* . 6
Walter Klag – *Gepatroj kontraŭ "sekskofro"* 9
Meditado super nia metodiko (Kruco) 10
István Ertl – *Sorobano kaj koro-bano* 13
LETERKESTO 15
Leg-raportetoj (Mag. Walter Klag) 16
DIVERSAĴOJ 17
ĈU NI ENKETIS SUFIĈE? (Enketo pri instruado 89-90) 21
ILEI labortable 28
Mike Sadler – *Lernu kaj instruu vivi en paco* 30
Margarete Saxl – *La Cseh-metodo por infankursoj* 32
Financa raporto de ILEI 1989 (Bertil Andreasson) 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Es 7.III, H-1034 Budapest (forrestas de majo ĝis aŭgusto) Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : *Vakas*

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Feldstr. 138, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal Univ., 430070 Wuhan, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

Motivado per ekzamenoj en lerneja Esperanto–Instruado en Hungario

BARCSAY Zsuzsa
metodika konsilisto ĉe Ŝtata Pedagogia Instituto

Skizo de la prelego

1.0 Enkonduko surbaze de jam okazintaj prelegoj en tiu ĉi konferenco
1.1 Kaŭzoj kaj celoj de fremdlingvo–lernado
1.2 Spacoj de motiviteco
2.0 Sistemo de ŝtataj fremdlingvo–ekzamenoj en Hungario
2.1 Kiel la ekzamenoj influas la lingvolernadon: Ekzameno kiel motivo
2.2 Statistikaj datumoj pri ŝtataj lingvoekzamenoj en Hungario
3. Reefiko de porekzamena studado al la motivado
4. Referencoj

1.0 Motivado estas psikopedagogia nocio/fenomeno; estus necese, ke psikologo aŭ psikopedagogo disvolvu ĝin en tiu ĉi konferenco.

La ĝisnunaj prelegintoj eliris el la instrupraktiko, ili kolektis siajn spertojn kaj donis specimenon el la propra "arto": kiel motivi gelernantojn/kursanojn dum la instruproceso, plejparte kun la celo: teni la atenton veka, vigla (ekzemple per muziko); fari la instruhorojn allogaj (ekzemple per ludoj); per ĝenerala klerigo veki motivojn (per korespondado; aŭ doni novajn informojn en ĝeneralkleriga temo, ekzemple heraldiko); per aplikado de la lernata lingvo sur aliaj terenoj – kun samtempa pliriĉigo de la tuta personeco de la lernanto.

La prelego de D–ro Dahlenburg konvinkis nin ĉiujn, ke nur tia instruisto povas kaj kompetentas motivi la gelernantojn, kiu mem estas motivita, kaj ke la motivoj por la instruisto venu el liaj intelektaj kaj psikaj postuloj. Sed nun ni reiru al la motivado de lingvolernantoj.

1.1 Kaŭzoj kaj celoj de lingvolernado. La aĝo de la gelernantoj forte influas, preskaŭ determinas, ĉu la kaŭzo, ĉu la celo dominas, do kiu el la duo motivas la lernantojn. En juna lernejana aĝo la kaŭzo povas esti, ke lernado de iu lingvo estas deviga en la lernejo (aŭ la gepatroj devigas sian infanon partopreni en lingvokurso). En tiu kazo, se la instruisto estas simpatia, la rezulto estas sufiĉe alta; se la intruisto ne estas simpatia, tion spegulas malalta nivelo de la rezulto.

Sub nocio "simpatia instruisto" ni komprenu objektivan prijuĝon fare de la gelernantoj, kiun – surbaze de vasta testado – ni povas resumi jene: instruisto estu serena, justa, havu grandan scion, estu postulema kaj konsekvenca, amu la lernantojn.

En la kazo de lingvoelekto fakultativa, ne nur la rezulto, sed entute la partopreno en la lernado dependas plejparte de la personeco de la instruisto. (Ja Esperanto kutime ne estas deviga!!) Ĉe pli aĝaj lernantoj – gimnazianoj, studentoj kaj plenaĝuloj – la celo dominas, do la celo motivas.

Konscie mi diras "dominas", ĉar en ĉiu aĝogrupo ĉeestas samtempe diversaj faktoroj en la motiviteco: ankaŭ al junaj lernejanoj oni povas konsciigi pri la celoj de lingvolernado, eĉ diferencigi inter la fina celo kaj la proksimaj celoj, atingeblaj paŝon post paŝo; kaj ankaŭ en pli matura aĝo gravas la personeco de la instruisto.

Kiujn celojn povas havi fremdlingvo–lernado?

Ekzistas lernantoj, kiujn interesas la lingvo mem: ĝia strukturo, simileco kaj malsimileco al jam konata(j) lingvo(j), ĝia kulturo, literaturo, ĉio, kion la lingvo reprezentas. Aliaj lernantoj volas apliki la lingvon nur kiel rimedon, ekzemple legi fakliteraturon, uzi ĝin en profesio aŭ partopreni internacian aranĝon k.s.[1]

1.2 Specoj de motiviteco. En la faka literaturo speguliĝas plej diversaj opinioj pri la motivado: kelkaj aŭtoroj konsideras la motivadon kiel organikan parton de la planado de instruado[2]; aliaj asertas, ke la rezulto de lingvolernado decidiĝas jam antaŭ la unua instruhoro, antaŭ la pordo de la klasĉambro, ĉar la rezulto dependas de tio, kun kiugrada motiviteco alvenas la unuopaj lernantoj.[3]

Ja kion oni nomas motiviteco? Motivita estas tiu celkonscia lernanto/studento, kiu volas lerni lingvon, havas pozitivan sintenon al la koncerna lingvo kaj klopodas, penas ellerni ĝin, t.e. investas tempon kaj energion en la lernadon. Depende de la kaŭzoj kaj celoj, de la psika inspiro de la lingvolernantoj reliefiĝas diverskarakteraj motivitecoj:

Integra aŭ kompleksa nomiĝas la motiviteco, se tion elvokas interesiĝo pri la lingvo mem kun ĝia ampleksa kultura fono. La lernanto volas spertiĝi en ĉiuj kvar komunikaj kapabloj.

Instrumenta aŭ rimedkaraktera ĝi estas, se la lernanto koncentriĝas aŭ limigas sin nur je difinita aplikebleco de la koncerna fremda lingvo (ekzemple en profesio); li ofte eĉ ne strebas por elformi ĉiujn kvar komunikajn kapablojn, sed nur ekzemple legadon. Ni devas mencii, ke tiuj du tipoj de motiviteco ne eksludas unu la alian; ili aperas samtempe, sed estas kutime klare konstateble, kiu el ili dominas.

Laŭ psikologia karaktero ekzistas interna kaj ekstera motivado:

Interna ĝi estas, se la lernado okazas por kontentigi intelektajn, psikajn postulojn;

- malkovri ion nekonatan

- deziro por influi la medion
- pretendo je spirita–mensa kaj fizika aktivado (ofte en maljuna aĝo)
- pretendo je rekono, akcepto en certa medio (en alia lando aŭ en faka medio), k.s.[4]

Ekstera estas la motivado, se oni lernas ekzemple en lernejo

- por bona juĝnoto; por laŭdo, por donaco
- por stipendio, kromsalajro
- por diplomo
- por ekzameno, kiu rajtigas plue fari ion.

Se ni volas prijuĝi, kiu motiviteco estas pli alta, pli valora, ni konstatas sendube, ke la integra/kompleksa, aŭ la interna estas tiu motiviteco, kies rezulto grave pliriĉigas la personecon kaj la karakteron de la lernanto. Do nia tasko estas veki tiajn motivojn kaj daŭre flegi ilin.

Tamen, ĉi-foje mi deziras paroli pri la efiko kaj rezulto de instrumenta (rimed-karaktera) kaj ekstera motiviteco, tute konkrete pri tio, kiel ŝtata rekono, agnosko de certaj Esperanto–ekzamenoj en Hungario, influas la lernemon de lernejenoj kaj studentoj.

2.0 Sistemo de ŝtataj fremdlingvo–ekzamenoj en Hungario

En Hungario ekzistas sendependa, ŝtata fremdlingva kvalifika instituto, kiu aranĝas trinivelajn ekzamenojn en fremdaj lingvoj, krome en la hungara lingvo por eksterlandanoj. La tri niveloj estas la jenaj:

- baza grado (nur parola)
- meza grado (skriba + parola); meza grado + faka lingvo
- alta grado (skriba + parola); alta grado + faka lingvo,

La proceduro kaj la konversacia temaro en ĉiu lingvo estas la sama. Ekzistas ja profesioj, postenoj, kiujn oni povas kaj rajtas plenumi nur kun la kondiĉo scii certa(j)n fremda(j)n lingvo(j)n kaj prezenti ateston pri tio. Ateston la menciita instituto donas, se la kandidato estas sukcese trapasinta iun gradon/formon de la ekzameno. La partopreno en ekzameno ne estas ligita al iugrada lerneja edukiteco, kiu ajn rajtas aliĝi, kiu estas minimume 14 jarojn aĝa.

En tiu ekzamensistemo enestas ankaŭ Esperanto ekde 1966 (kiel unu el la grandaj rezultoj de la 51–a UK en Budapeŝto). Do, Esperanto estas same traktata kaj la atesto pri Esperanto same tiom valoras, kiel ĉe dekoj de aliaj lingvoj. (Tamen, la valoron de Esperanto–ekzameno determinas la aplikeblecoj de la lingvo mem.)

2.1 Kiel tiu ekzamensistemo influas la fremdlingvo–lernadon?

En la tria ĝis la oka klasoj de elementa lernejo ekzistas instruformo intensa (po 4–5 horoj semajne) dum 6 jaroj. Fine de tiu periodo, en aĝo de 14 jaroj minimume bazgradan, sed ofte eĉ mezgradan ekzamenon sukcese trapasas pluraj lernantoj. Estas bela kaj utila fino de la studoj.

En la lastaj jaroj venis dekreto de la Ministro pri Klerigado, laŭ kiu abiturientan ekzamenon pri fremdaj lingvoj povas anstataŭi minimume mezgrada ŝtata lingvoekzameno. Instruistoj iom protestas kontraŭ tio, ĉar la lingvoekzameno ne inkludas, ne postulas konojn de la kultura fono de la lingvo, sed la abiturienta ekzameno ja jes. Sed gelernantoj ĝojas pri la ebleco, ĉar tiel ili jam pli frue povas trapasi la ŝtatan lingvoekzamenon, kaj en la lasta studjaro de la gimnazio ili jam ne multe okupiĝas pri lingvolernado, sed povas dediĉi pli da tempo kaj energio al aliaj abiturientaj studobjektoj. Tio signifas, ke lastatempe pli kaj pli da gimnazianoj frekventas ŝtatan lingvoekzamenon.

Ankaŭ alia kialo troviĝas en la motivoj: ekde 1990, por rajti fariĝi universitata aŭ altlerneja studento, oni devas prezenti du lingvoekzamenojn: min. mezgradan pri la lingvo, grava por la studoj kaj min. bazgradan pri iu alia lingvo. Ni povas antaŭvidi, ke inter tiuj, kiuj estos havantaj kontakton kun Esperanto, multaj elektos ĝin por la ekzameno en la dua kategorio.

Ankaŭ plia instigo aperis. En unuopaj kazoj Esperanton ĉe ni en Hungario akceptas universitatoj kaj eĉ la Akademio de Sciencoj kiel unu el la fremdlingvaj kondiĉoj de doktoriĝo, se la kanditato pruvas, ke Esperanto estas grava lingvo por la temo de la disertacio aŭ por la faka laboro. Sekve kelkaj esperantistaj doktor-kandidatoj aliĝas al ŝtata lingvoekzameno pri Esperanto, ĉar ne estas malfacile pruvi, ke Esperanto ja helpas en internaciaj fakaj kontaktoj (eĉ se la faka lingvo en Esperanto ne estas sufiĉe evoluinta kaj ne tro abundas faka literaturo en Esperanto!).

Resume: Esperanta ŝtata lingvoekzameno en Hungario povas servi al lernejanoj, studentoj kaj sciencistoj – en respektivaj ŝtupoj – por:

- fini bazlernejan intensan Esperanto–lernadon
- anstataŭi abiturientan ekzamenon pri elektebla lingvo
- plenumi fremdlingvan kondiĉon de aliĝo al universitataj k. altlernejaj studoj
- plenumi parton de universitataj postuloj pri fremdlingvo-studado doktoriĝi
- rajti plenumi certajn oficojn.

Por esti objektiva, ni tamen devas konsideri, ke la pozicio de la lingvo Esperanto kaj ĝia rolo en kulturo, politiko, ekonomio, scienco, tekniko, ktp. entute en la vasta internacia komunikado estas forte limigita. Tio, kompreneble, determinas la nombron de tiuj, kiuj volas kaj povas utiligi Esperanto–ekzamenojn sur kiu ajn kampo de la vivo.

2.2 Statistikaj datumoj pri ŝtataj lingvoekzamenoj en Hungario

Jaro	Sumo	Baz-	Mez-	Superagrada	Superagrada,faka
1985	(16)	2	7	6	1
1986	(58)	6	7	45	–
1987	(71)	9	18	44	–
1988	(57)	11	6	40	–
1989	(79)	6	28	44	1

(disponigita de d-ro Ferenc Jáki, komisionestro)

La statistikaj datumoj montras kaj la absolutan nombron, kaj la evolutendecon de la nombro de eldonitaj atestoj. Kaj la tendencon oni tamen ne povas preteratenti.

3. Reefiko de porekzamena studado al la motivado

El la ĵus diritaj oni povas konkludi, ke la nun kreskanta populareco de tiuspeca ekzameno baziĝas sur la celo havi dokumenton/ateston pri lingvoscio, por ke poste oni sukcesu aliĝi al pli altaj studoj.

Tiu unuaranga motivo estas instrumenta kaj ekstera, do el la malpli valora kategorio.

Sed por sukcesi pri la ekzamenoj estas rekomendinde (ne devige!) partopreni preparkursojn. Kaj en la kursoj la lingvolernantoj povas ricevi duarangan motivon de la instruisto kaj de aliaj kursanoj tiel, ke ne nur rimed–karaktere ili volu havi lingvoscion, sed ke enplektiĝu la tuta personeco de la lernantoj. Ili lernu la lingvon ne nur por la atesto mem, sed ankaŭ por la lingvo, kultura fono kaj por tiuj valoraj internaciaj personaj kontaktoj, kiuj mem ofte estas plua motivo por okupiĝi pri nia lingvo.

Tiu plua motivado estas la respondeco de la instruisto kaj de la lernolibro–verkisto, kiuj ankaŭ mem devas esti motivitaj por kapabli plenumi tiun destinon.

4. Referencoj

[1] Zerkowitz, Judit: Tanítsunk nyelveket! Általános módszertan nyelvtanárok számára. (Ni instruu lingvojn! Ĝenerala metodiko por lingvoinstruistoj.) Budapest: Tankönyvkiadó, 1988.– 183 p. Bibl. p.172–179

[2 kaj 4] kiel [1]

[3] Dálnoki–Fésűs, András: A nyelvoktatás–nyelvtanulás dilemmái és útválasztásai: Egy alapmódszer vázlata (Dilemoj kaj vojelektoj de lingvoinstruado–lingvolernado) Budapest: Akadémiai Kiadó, 1988. – 195 p.17 cm. Bibliogr.p.183–195

Kial kaj kiel enkonduki en la Esperanto-kurson

(Prelego en la kunveno por fondiĝo de la Ĉina Societo por Esplorado pri Esperanto-Instruado en Superaj Lernejoj)

SHAO Rong (Soliva)

La ĉi tie pritemata E-kurso entenas ne nur la oficialan en la tuttaga lernejo sed ankaŭ la postlaboran. Ĉar la tekstoj de la lernolibro ĝenerale tute ne tuŝas, kion devas diri la enkonduko en la kurson, kaj laŭ mia informiĝo mankas ankaŭ la enkonduko al parto da kursoj en Ĉinio, tial necesas paroli pri ĉi temo aparte.

I. Kial nepras enkonduko en la kurson?

La kaŭzo, ke al iuj kursoj mankas la enkonduko, probable estas, ke ties neceson kaj gravecon oni ne konscias. Kial do enkonduki?

Ĉar

l. E-o estas malsama al la aliaj lingvoj; ĝi ne nur estas lingvo, sed enhavas denaske en si esperantismon (vidu sube la duan parton de ĉi artikolo). Ĉi tiu estas unu el la fundamentaj propraĵoj de la lingvo. Kiu lernas kaj uzas ĝin nur el vidpunkto de intereso aŭ pura lingvo, al tiu mankas idealo kaj spirito de la esperantismo, tiu ne povas fariĝi vera kaj bona esperantisto. Se la e-ismon oni ne klarigas, ne eblos aŭ malfacilos ĝin kompreni.

2. E-on ĉe la komenco preskaŭ ĉiuj lernantoj ne komprenas, aŭ nur malmultaj iom konas. Tial nur se la instruisto komence provizas al ili pravan elementan scion pri la lingvo, iliaj malscio kaj miskompreno eble nuliĝas, kaj parto inter ili povas levi la intereson kaj persisti en la lernado.

3. Kvankam lingvajn trajtojn kaj ecojn de E-o oni povas kompreni iom post iom en la lernado, tamen aliajn rilatajn necesajn sciojn ili ne povas akiri en la lernolibro, tial tiujn pritrakti necesas en aparta tempo.

4. Regulo de la kurso estas, ke ne malmulte da lernantoj ĉesigas sian lernon dum la daŭro de la kurso. Tial ni komence ne perdu la ŝancon por trakti prefere ilin kiel objektojn de propagando pri prava elementa kompreno pri E-o, ke ili eble fariĝu ose amikoj de la lingvo.

II. Kiel enkonduki?

Ekde kiam la nedeviga E-kurso funkciis en 1984 en Dalian-a Universitato de Scienco kaj Teknologio, ni persistis komence de ĉiu kurso en lekciado pri la enkonduko. Laŭ sperto decas pritrakti la sube diritan enhavon al la ĉinaj lernantoj.

Antaŭ ol eniri en la kernon, oni devas vidi klare, priparoli ke la enkonduko konsistas el du partoj: la unua devas nepre priparoli al ĉieaj ajn lernantoj, dum la dua dependas de la regiono. Ekzemple, oni povas priparoli iom pli da historio de Esperanto kaj ĉefaj internaciaj organizoj kaj aktivadoj, kiaj UEA, UK, ktp, al eŭropanoj, ĉar tie facilas eksterlanden iri kaj estas ĉefaj regionoj aktivaj por E-o; sed male por la ĉinaj lernantoj.

Sube estas programo de la enkonduko kun eventualaj rimarkoj.

1. Kio estas E-o?

1.1. Originala nomo — Esperanto, kiu signifas tiun, kiu esperas. Ĝi estas homfarita, internacia helpa lingvo.

Rim.1. Nepras emfaze klarigi jenajn 3 punktojn por nuligi respondajn miskomprenojn:

a/ Ĝi ne volas nek povas anstataŭi iun ajn nacian lingvon;

b/ Ĝi ne intencas proklami sin la "mondlingvo", kio ĝin mise nomas la ĉinoj.

c/ Uzi ĝin ne atencas nacian dignon. Estas male, kiam oni proponas, ke la angla lingvo fariĝu oficiale supernacia "mondlingvo".

1.2. Ĝin kreis kaj publikigis en 1987–07–26 polujano, juda okulisto Zamenhof.

Rim.2. Indiku, ke Zamenhof estis judo.(1)

1.3. La historia fono por la naskiĝo de la homfarita lingvo. E-o estas la unika vivanta lingvo homfarita.

2. Fundamentaj trajtoj de E-o

2.1. Lingvaj trajtoj — reguleco kaj logikeco

2.1.1. Ekzemplo de facila prononco — unu-al-unu-a rilato inter sono (sonero = fonemo) kaj litero.

2.1.2. Kelkaj ekzemploj de la gramatikaj reguloj: Finaĵoj: -o, -a, -i, -e; verbo-ŝanĝo ne dependas de la persono kaj nombro; reguleco de tempo; multnombro indikiĝas per -j.

2.1.3. Reguleco kaj elasteco de la vortfarado

2.1.3.1. Vorta kunmetado similas al tiu en la ĉina.

2.1.3.2. Derivado: ekzemple la radiko long-a.

Resume indiku: Por la etnaj lingvoj la lernantoj povas en tre malmultaj ŝancoj mem formi vortojn novajn por si. Sed male, por E-o povas per la du ĵusaj metodoj formi grandnombron da novaj vortoj, eĉ neologismoj, el malmulte da radikoj kaj alfiksoj (afiksoj), tiel redukti ege la memorendan kvanton. Tio estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de plifacileco por la lerno de E-o.

Rim.1. Se la enkonduko entute prenas 100 minutojn, ĉi parto apenaŭ 30 minutojn: ne trou, ĉar precipe tra la posta lernado de la libro oni profundigu kaj plivastigu la scion; tamen ne maltrou, ĉar oni devas ĉi tie doni ĝeneralan bildon al la lernantoj.

2.2 Nelingva trajto – esperantismo(2)

2.2.1. Ecoj – neŭtraleco, neregistareco kaj movadeco.

2.2.2. idealo

2.2.2.1. interkompreno, egaleco, amikeco kaj paco.

2.2.2.2. Batalo por la unika internacia helpa lingvo en la sciencoj kaj teknikoj.

2.2.3. spiritoj – sindonemo, entuziasmo kaj aktiveco.

Rim.2. Montrendas: El la supraj vidpunktoj tiuj, kiuj ne konformas al la "Bulonja Deklaracio"(3), estas privataj; tamen sekve de evoluo de la objektivaj aferoj la esperantismo ŝajne riĉigendas en enhavo.

Rim.3. Ĉi parto absolute ne povas ellasiĝi. Ĝin eltiri estas eltiri animon, kaj postrestos korpo de nura lingvo. Multaj ne povas persisti en la batalo por E-o aŭ faras ion ne taŭgan por ĝi pro tio, ke mankas al ili animo.

3. La utilecoj de E-o

3.1. Ĝi jam akiris lokon en la historio de monda literaturo.

3.2. Pere de korespondoj internaciaj, publikigaĵoj, disaŭdigo, turismo, universalaj kongresoj, ktp profundiĝas kaj plivastiĝas interkompreno kaj amikeco inter diverslandaj popoloj, kaj evoluas monda paco.

3.3. Esperanto estas bona modelo de lingvo kaj helpas multe al la lerno de okcidentaj lingvoj.

3.4. Ĝi povos ludi pli kaj pli da rolo en la evoluigo de la sciencoj kaj teknikoj.

Du ekzemploj: Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) kaj Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT)

3.5. Ĝi ludis kaj -as bonan rolon en la naciliberiga batalo kaj socialisma konstruo de Ĉinio. Tial ĝi akiras subtenon kaj evoluas en nia lando.

Ekzemplo 1. La sciigo (/82/107)(4) de la antaŭa Ŝtata Ministro pri Edukado.

Ekzemplo 2. Ĉina Esperanto-Eldonejo estas unika ŝtata eldonejo en la mondo; Pekina disaŭdigo per E-o; *El Popola Ĉinio* kaj *LA MONDO*; ktp.

3.6. Vidpunkto pri la utileco de E-o

Kompare kun la ĉefaj etnaj lingvoj ĝi taŭgas nur iom, tamen tiuj havas historion de kelkmil jaroj kaj ĉi tiu ĵus eniris en la duan jarcenton, forta subteno kaj granda apogo fare de rilataj ŝtatoj kaj nacioj respektive al tiuj kaj neniu por ĉi tiu – ĉu oni povus tropeti? Kaj ju pli da homoj uzas ĝin, des pli ĝi taŭgas. Ĝi estas tia, kia Marksismo: se oni ĉi tiun ne lernus, uzus kaj plivastigus lige al la laborista movado, ĉu ekzistus hodiaŭ la pli ol dek socialismaj landoj?

Rim. Oni devas paroli pri la utileco de E-o konforme al la fakto, nek troige nek redukte. La antaŭa estas la ĉefa erara tendenco por iuj en la propaganda praktiko.

LITERATURO

(1) Golden B. "Ĉu ni instruu, ke d-ro Zamenhof estis pola kuracisto" IPR, 1988/2, 16–18.

(2) Hujucz (Hu Yuzhi): La idealo kaj la realo de Internacia Lingvo (Ĉina traduko fare de Chen Yuan), Ŝtata eldonejo "Ŝanvu", Pekino, 1986.

(3) Deklaracio pri la esenco de la esperantismo", troviĝanta en "Fundamento de Esperanto", E.F.E. Marmande, 1963, 33–37.

(4) La esenco de la Sciigo troviĝas en la unua paĝo de la prelego fare de Shao Rong (Soliva): "Kelkaj faktoj pri la oficiala Esperanto-instruado en Ĉinio", privata eldono, Dalian, 1989.



GEPATROJ KONTRAŬ „SEKSKOFRO"

La 29an de aprilo 1989 mil gepatroj, instruistoj, klerikoj kaj kuracistoj demonstraciis antaŭ la aŭstria ministerio por edukado kontraŭ la t.n. sekskofro. Temas pri instruhelpiloj por seksedukado, kiu lastatempe oficialiĝis. Multaj malaprobas tiun „kofron", ĉar ĝi laŭ ilia opinio estas nelaŭleĝa, ofendas religianojn kaj faras la sekson publika afero. La sekskofro, laŭ ili instigas la infanojn daŭre okupiĝi pri la seksorganoj kaj favoras samseksemon (gejecon). Jen kelkaj citaĵoj el la kofro:

KONTAKTOJ: INICIATOJ DE KNABINOJ. „Se li rigardas min, mi ridetas kaj mi palpebrumas per la dekstra okulo." „Mi iras al li kaj invitas lin sidiĝi ĉe mi." „Mi ŝajnigas min laca kaj sidiĝas sur liaj genuoj."

PARTNERECO – GEEDZA VIVO – FAMILIO. „Se oni parolas pri geedzeco, aliaj kunviv-manieroj ne estu malplivalorigitaj."

DILEMO-HISTORIETOJ:

A. NEOFICIALA KUNVIVADO? Moralteologo atentigas, ke

ŝtato kaj religio prave protektas la familion, sed „kiel vi pensas pri la daŭra enmiksiĝo de la ŝtato kaj eklezio?"

B. „ĈU MI ESTAS GEJA?" demandas sin 18jarulo. Psikologo konsilas: „Ne subpremu viajn sentojn! Aliĝu al geja asocio!'

Mag. Walter Klag, Vieno

Meditado super nia metodiko

En la disvastigado de fremdaj lingvoj gravan rolon ludas la instruado, ĉe la esperantistoj ĝi estas demando pri vivo aŭ morto. Ne estas do hazarde, ke ni metas ĝin sur unu el la unuaj lokoj, kaj ke ni sekvas kun aparte granda atentemo ĉiujn reformojn koncerne la fremdlingvan instruadon.

Post pli ol dudek jaroj da praktika lingvoinstruado ŝajnas al mi ĉiam pli kaj pli, ke ni mistrafas la celon sekvante fidele la metodojn de la instruado de naciaj lingvoj, fanfaronante samtempe pri eksterordinara facileco de Esperanto. Se ĝi fakte estas tiom simplega, kiom ni asertas, kial sekvi humile la padon, iritan de malsimplaj naciaj lingvoj, kial ne elekti pli rektan vojon al la celo?

Inter lingvoj naciaj kaj internacia sin trovas ne sole kvanta, sed ankaŭ kvalita diferenco, kvankam ne mankas, kompreneble, multaj trajtoj identaj. Ĝis nun – eble por doni al nia lingvo aŭtoritaton – ni tro emfazis la komunajn ecojn kaj klopodis kaŝi la diferencojn, sed mi ne volas ĉi tie studi tiun demandon, ĝi kuŝas ja ekster mia temo, mi deziras nur turni vian atenton al la menciita fenomeno por veni al kelkaj konstatoj espereble fruktodonaj.

Nuntempe, kiam ni staras antaŭ baldaŭa disflorado de Esperanto-instruado en Hungario, mi denove trafoliumis ĉiujn miajn librojn, kiuj parolas pri lingvoinstruado, kaj trovis la 16-regulan "plenan gramatikon" kaj la Ekzercaron de Zamenhof la plej sekvinda lernolibro. Kial? Ĉar la supraj verketoj estas kristale klaraj, ĝis ekstremo simplaj kaj celkonformaj. Ili ne enhavas superfluan vorton aŭ esprimon, detaloj ne nebuligas la esencon: klarecon de la internacia lingvo. Kaj fakte, ni ofte predikas pri la simpleco de Esperanto, tamen ni instruas ĝin kiel malsimplan nacian lingvon.

Se ekzistas lingvo, kiu helpas rapide formi pri lingva strukturo, tiu sendube estas Esperanto. Ne malkovrĭ ĝian modelan strukturon estas ne eraro, sed rekte kulpo kontraŭ la sobra konscio.

Unuvorte: **Esperanto**, estante speciala lingvo, **bezonas specialan aliron**, la studata materialo determinas ja la procedojn.

En kio konsistas lingvokono? En aŭtomata apliko de la gramatikaj reguloj kaj en la posedo de relative granda stoko de vortoj. Zamenhof en ambaŭ terenoj zorgis pri gravaj plifaciligoj. Li reduktis la gramatikon al 16 mallongaj reguletoj, kaj la vortaron al ĉirkaŭ mil radikoj (kun multflanka aplikado de Esperanto ilia nombro kompreneble senĉese kreskas).

Se nia lingvo estas tiel facile travidebla strukturo, por kio do rifuĝi en diversaj afliktaĵoj de nacilingvaj metodoj? Tiel malgrandega materialo estas perfekte alproprigebla en la daŭro de kelkaj tagoj kaj la tuta plusa tempo necesas nur por elformi refleksojn.

Mi ne povas forgesi, ke dank' al Esperanto mi komprenis LA GRAMATIKON, kaj aldone estas menciinde, ke siatempe (en 1956) mi uzis la unuan hungarlingvan Esperanto-lernolibron, kompilitan de Á. Barabás en la jaro 1898, do tute ne modernan lernilon. Lastatempe mi ofte pensas pri tio, ĉu trovinte iun el la modernaj lernolibroj, mi estus ĝin tiel klare kompreninta, kiel el tiu "primitiva". Mi komencas dubi pri tio.

Sed anstataŭ longe babili mi aliras al la esenco de la artikolo: **la esperantistoj**, miaopinie, **devas reiri al la Zamenhofa fonto**, kaj ŝangi en ĝi nur tiom, kiom la pasinta jarcento alportis kun sciencaj malkovroj.

Kiel do aspektu la **instruado de gramatiko de Esperanto**? Ni prenu sinsekve (laŭ metodike logika ordo) la regulojn, kaj ekzercu nin pri ili konstruante, se eblas, antipodajn formojn, kiel ekzemple ĉe substantivoj: krajono – krajonoj, paperfolio – paperfolioj, knabo – knaboj ktp., ĝis fine formiĝas la lingvosento pri pluralo. Aŭ por distingi prezencon kaj preteriton ni povas preni tiajn ekzempojn: Nun mi ne sidas. – Antaŭe mi sidis./ Nun vi rigardas. – Antaŭe vi ne rigardis./ Nun ŝi parolas. – Antaŭe ŝi ne parolis., ktp.

La unua paŝo en Esperanto ĉiam estu klara kompreno de la koncerna gramatika regulo, poste sekvu ties demonstrado per antipodaj ekzemploj, kaj fine prenu celkonformajn ekzercojn pri la nova materialo. La Ekzercaro de Zamenhof estas preskaŭ ideale planita kaj konstruita, ĝi estas modifenda nur pro la forpasinta jarcento, dum kiu nia tuta medio konsiderinde aliformiĝis.

Ne malpli gravas **la vortoj**. En Esperanto, pro facileco de la gramatiko, ili bezonas eble pli grandan atenton ol la gramatiko. Alproprigado de la leksiko ankaŭ en la internacia lingvo postulas paciencon kaj konsekvencon. La plej okulfrapa trajto de nia leksiko estas eksterordinara kombiniĝemo de elementoj. Ĉiu praktikanta instruisto scias, kiom da energio necesas por elformi la kapablon percepti kvazaŭ senkonscie kunmetaĵojn de certa radiko, ekz. ĉe ARB-: arbO, arbEGo, arbegARo, arbIDo, arbohakisto, arbofolio, arbara, senarba, senarbigi, arbaĵo, arbarumi, arbetaĵo, ĉefarbaristo, praarbaro, fruktarbo, Kristarbo, arbokulturo k.s. Centoj, eĉ miloj da modeloj rezultas iom post iom tujan percepton de iu ajn el la supre prezentitaj vortoj. La vojo kondukas tra konsekvencaj ekzercoj. Unue oni devas diserigi ilin kaj konstrui novajn laŭ ilia analogio, kiel ekz.: SENARBA – sennoma, senventa, senkulpa, senplua, senhava, senvesta, senporda k.a. Ĉar estas evidente, ke homo, kiu aŭdinte la vorton "malsanulejo" bezonas longan tempon por analizi la vortelementojn por veni fine al la senco de la vorto, jen tiu homo ne povas kompreni aŭ paroli. Tia persono scipovas uzi la lingvon nur skribe.

respondas en si hungare, sed alvokite li ŝaltas sen tro da malfacilo je Eo. (Kiam la infanoj en la paŭzo malkovris, ke mi ja parolas hungare, ili emis respondi en tiu lingvo, sed per lerta kombinemo ili komprenis eĉ demandojn miajn kun maloftaj vortoj, kiel infano komprenas plenkreskulon en la gepatra.)

Mi apenaŭ kapablas noti la eventojn: ĉen-ludo pri nomoj de legomoj, laktaĵoj, veturiloj; prononcekzerco; strukturaj ekzercoj; eĉ devus okazi samtempa interpretado, se la tempo ne mankus. Anstataŭe knabo ekstaras aplombe sur seĝon kaj improvize respondas je alies demandoj – kvazaŭ gazetara konferenco. Poste sama sorto trafas min: „Kiu vi estas? Ĉu vi havas belan edzinon?" vicas demandoj.

Post la paŭzo japana instruisto (lerninta Eon por instrui ĉi tie) ekzercigas kalkuladon per sorobano, la japana abako. Mia nova sambenkano – ĉu li atingus mian talion? – klarigas en senhezita Esperanto, kiel manipuli la ruzan kalkulilon. Mi baldaŭ sukcesas elrezultigi 73 + 22 dum unu minuto. Ili dume estas plenigintaj tutan taskofolion kun similaj demandoj...

Fine de l'instruado, ne facilas deturni Esperantina-n al interparolo, ĉar la etuloj alkroĉiĝas, kisas, flatas ŝin... Poste en la „Esperanto-ĉambreto" ŝi rakontas, ke la plej taŭga aĝo por lingvo-lernado finiĝas je la oka jaro, la dua lernema periodo je la dekdua... Necesas do elformi ĝeneralan lingvan modelon en la plej kaptema aĝo, pere de Eo: „propedeŭtiko", per sciencuma vorto. En la unua duonjaro la infanoj havis po kvar Eo-horojn tage, nun iom malpli. Esperantina estas nehungarino, ŝia metodo tamen ne estis tute Cseh-a: ĉiam ĉeestis hungara instruisto, „Esperanto-patro" por la infanoj, kiu la gramatikaĵojn klarigis, por rapideco, hungare. (Alia principo: havi laŭeble plurajn instruistojn en la klaso por kiel eble plej da helpo al la infanoj.) Nun tio ne plu necesas. Cetere, la gepatroj, kiuj donis sian konsenton al la lernado de siaj infanoj en speciala klaso, povis memvole partopreni E-kurson – sed nun kvazaŭ la infanoj instruas siajn gepatrojn pri la lingvo.

Laŭ la komencaj planoj ili ekus pri la angla en la dua jaro, sed tio ŝajne ŝoviĝos al la tria. Dume ili ludas, ĵudas – ankaŭ sporto nepre apartenas al la lernoprogramo...

Ĵuse ankoraŭ ŝajnis, ke simple mankos mono por daŭrigi la aventuron – nun ili estas finance savitaj, eble. Estos ekstreme interese, kio fariĝos el la lernintoj de tiu ĉi speciala klaso, kiu ne estas simple plua propedŭtika eksperimento – ne, ĝi estas bone trapensita, kohera instru-sistemo, pere de kiu Eo, ludanta specifan rolon, povas favorigi la bildon pri si en la pedagogiaj medioj de Hungario.

Postnoto: trapasonte Budapeŝton post septembro 1990, ne forgesu sciigi pri Via vizit-intenco la klason, kiu ŝatas havi gastojn.

Adreso: Fondaĵo TALENTO, H-2041 Budaörs, Pf.50, Hungario

Leterkesto

En la artikolo LA PLEJ FACILA LINGVO – MALFACILE LERNEBLA la aŭtorino tuŝas tre gravan problemon, sen montri la VERAN KAŬZON. Ŝi konstatas, ke estas homoj kiuj lernas la lingvon aŭtodidakte, de unu folio, dum mallonga tempo, do ne kulpas la LINGVO.

Ŝi ankaŭ konkludas, ke ne kulpas instru-metodoj, ĉar estas kelkaj jam pruvitaj ekz. ĉe CSEH-metodo (kiu cetere tute ne malmoderniĝis, kiel opinias kelkaj) k.s.

Laŭ mi NE KULPAS manko de lernolibroj kaj aŭdvid-instruaj materialoj (povas manki nur informo pri ilia ekzisto, alia malsano de nia movado).

Sed... ĉefe TUTE KULPAS la manko de BONAJ INSTRUISTOJ, kaj kiel diris A.CSEH, mi citas el liaj *Konsiloj por instruantoj* n-ro 8 "en la kurso la plej grava persono estas instruisto. Li (ŝi) povas sukcesigi la plej MALBONAN metodon (sekve instrumaterialon), kaj povas DETRUI la plej BONAN."

Ekzistas ankoraŭ alia diraĵo, ke NE ESTAS MALBONAJ LERNANTOJ, ESTAS NUR MALBONAJ INSTRUANTOJ. Fariĝas tempo, ke ni konsciiĝu pri la ROLO DE INSTRUISTO en E-instruado.

La aŭtorino mencias troan engaĝiĝon de instruisto, sed tio ne estas la plej grava obstaklo, kvankam povas esti ĝena. Estas multaj aliaj ecoj, kiujn DEVAS posedi bona instruisto, ni menciu nur kelkajn bazajn kiel;

1. bona kono kaj uzo de la lingvo,
2. bona scio pri diversaj instrumetodoj kaj elekto de la plej taŭga por propra personeco (ne ĉiu metodo taŭgas por ĉiuj; la samo rilatas instrumaterialon).
3. ŝato de instruado kaj fido al uzata metodo
4. kapablo racie prezenti la lingvon, veki intereson (eĉ scivolemon), kapti atenton kaj kapabli teni ĝin, por ke "la instruisto ne skribu sur akvon, sed ĉizu en ŝtonon" – kiel diris A. CSEH.

Tion oni atingas, se oni kapablas adaptiĝi al aktualaj instru-lern-kondiĉoj kaj situacioj ofte neantaŭvideblaj.

Mi nur supraĵe tuŝis la temon kaj mi atendas, ke iu pli kompetenta regalos nin per pli ampleksa artikolo pri LA ROLO DE E-INSTRUISTO EN LA DUA JARCENTO, des pli se ni deziras proponi nian lingvon al KOMUNA EŬROPA DOMO.

Mila v.d. Horst-Kolinska

ESPERANTO, organo de UEA, en siaj numeroj de januaro kaj februaro 1990 rivelis plurajn plendojn pri nunaj malprogresoj de nia lingvo. Kial? Ni ankoraŭ ŝatas ĝin, sed ni ne vidas per kio ĝi povas servi al ni, aŭ ni al ĝi!

Estas fakte problemoj, sed malfacile solveblaj, ĉar de lando al lando la kondiĉoj varias; la rimedoj mankas, la bezono ne montriĝas evidenta, la personoj estas tro disaj.

Ni provis instrui Esperanton apud aliaj devigaj lernejaj programoj. Sed Esperanto estas tute alia konstruaĵo.

Mi cerbumadis tiujn demandojn, kaj starigis liston de tridek proponoj. Ĉiu grupo aŭ socieo povus diskutigi ilin kaj eble tiri profiton de tiaj pripensoj.

Mi volonte sendos kopion de tiuj ses paĝoj, kiuj titoliĝas: Esperanto antaŭen... kien?

René W. Perrenoud
Jardillets 25, CH–2068 Hauterive, Svislando

LEG-RAPORTETOJ

Aŭstralia antologio

Redaktita de Alan Towsey, eldonejo Edistudio, Pizo, Italio. 429 paĝoj, bindita, prezo 49 000 italaj liroj.

Enhavo: ampleksa enkonduko en la aŭstralian literaturon sur 18 paĝoj (poezio, novelo, dramo, eseo); tekstoj kaj poemoj de 65 aŭtoroj; glosaro de klarigendaj vortoj. Iom ĝenas kelkaj preseraroj kaj lingvaj neklaraĵoj. La tradukitaj poemoj ŝajnas al mi nefacile legeblaj. Tamen la bela kaj bone bindita libro valoras la prezon kaj donas valoran superrigardon pri la aŭstralia literaturo el du jarcentoj.

Wendelin ÜBERZWERCH: Homoj tiaj kaj aliaj.

Tradukita el la germana lingvo de Alois MEINERS. Eldonejo Armin Gmeiner, D-7790 Messkirch, 1989, broŝurita, 91 paĝoj, 17 cm, ISBN 3-926633-22-0, prezo 8 germanaj markoj.

La bele presita libro enhavas dudekon da gajaj aŭ pensigaj historioj el Germanio de la 1920aj jaroj. Iom ĝenas preseraroj kaj germanismoj („Tio nombras nenion" ktp.) Laŭ mia opinio estus rekomendinde korektigi tradukaĵon per alilingvanoj. Preskaŭ neelparolebla estas la titolo. Kiam mi legis la libron en trajno, iu bubaĉo primokis ĝin. Mi ne malkovris, ke temas pri Esperanto, por ne malhelpi la finan venkon de la internacia lingvo. Tamen – leginda ĝi estas!

Mag. Walter Klag, Vieno

LA UNUAJ KASTORAĴOJ

Rimejo de Wojciech Usakiewicz estas poemareto ideale uzebla en porinfanaj kursoj, plaĉa legaĵo por iom-lernintoj kaj – kial ne? – denaskuloj. Laŭ la originala intenco temas pri broŝureto, kiu lingve akompanas Kastoretojn, Brunajn, Arĝentajn kaj Orajn Kastorojn: la etajn membrojn de la Kastora Klubo. Post enkonduka versaĵo „Kiel estiĝi kastoro?", dudeko da poemetoj strukturiĝas je principo de laŭgradeco. Ni citu la komencan (*Mi*): „Mi nomiĝas Vanda. / Mi estas knabino. / Mi loĝas en Pollando, / en la urbo Lublino." kaj la lastan (*Bonŝanco*), por sentigi la kreskon de nivelo: „Homo, eĉ klera kaj tre esplora, / fojon post fojo devas erari, / kaj dank' al tio ĉiam ankoraŭ / restas al ĉiu multe por fari." Kvarpaĝa pola vortolisto klarigas preskaŭ ĉiun enhavatan radikon – utile por polidoj senvortaraj, anstataŭeble per instruista helpo por aliaj. Tre rekomendebla libreto.

Cetere, Kastora Klubo estas daŭre „internacia Esperanto-klubo de amikeco, al kiu apartenas infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj el 60 landoj; kiu helpas trovi korespondamikojn en aliaj landoj – sufiĉas sendi al la klubo informojn pri la familia kaj persona nomoj, naskiĝdato, sekso kaj interesiĝoj; kiu sendas senpage sian bultenon al la Esperanto-instruantoj, kiuj kunlaboras kun la klubo (la bulteno enhavas informojn pri la kluba vivo kaj ankaŭ facilajn legaĵojn, versaĵetojn, kanzonojn, uzatajn de multaj instruantoj kiel helpiloj dum la laboro). Petu informojn ĉe *Kastora Klubo, ul. Pulawska 3-11, 02-515 Varsovio, Pollando*."

ĈU ESPERANTO ENIRAS MONDON?

La Sanja Esperanto-Grupo de Benevento, Italio eldonis kaj dissendis broŝuron kun la ambicia kaj simpatia projekto de Riccardo dell'Aquila, *Operacio Esperanto eniras mondon.* La kerno de lia ideo, prezentita kun aŭtenta entuziasmo kaj kortuŝa retoriko, estas produkti *„kurson, surbendigitan en videokasedoj, kapilarece dissendatan pere de la reto de lokaj privataj sendostacioj"*, kiu *„konsistas el preskaŭ tridek lecionoj"* kaj estas *„tute esperantlingva, sama kaj ununura por ĉiuj landoj"*. Ĝi *„devas esti nepre pretigata sub la rekta gvidado de UEA, kiu" „kunlabore kun ILEI", „direktos ĝian produktadon kaj kontrolos ĝian enhavon"*. Por la dissendo *„oni uzos (...) la lokajn malgrandajn privatajn staciojn"*, kiuj *„akceptas bonvole enmeti en sian programadon elementojn kiuj kostas nenion". „Ĉiusemajne estos dissendata po ununura leciono, (...) plurfoje ripetata dum la tuta semajno"*, principe la sama en ĉiuj landoj, en kiel eble plej da elsendejoj samtempe. La operacio *„devus starti prefereble en septembro*

1991 kiam, verŝajne, la debato pri intereŭropa komunikilo atingos la plej streĉan aktualecon."

„Ni havos nek eblecojn nek energiojn por fari pluajn provojn konvinki nian tutan samideanaron" avertas la aŭtoro. *„Ni havos nek tempon nek volon por alfronti polemikojn kaj la kutimajn senfruktajn kritikojn."* Kompreneble, ankaŭ ni alvokas al kunlaboro je tiu grandega projekto (kontaktu s-anon dell'Aquila ĉe kluba adreso Corso Vittorio Emanuele 39/INA, 82100 BENEVENTO, Italio) kaj esperas, ke s-ano dell'Aquila sufiĉe energios, post ol alvoki, ankaŭ por kunordigi la realigon de l'„operacio" – la spertoj ja montras, ke en E-medio (kaj alie) ne sufiĉas lanĉi eĉ la plej genian projekton sen plu teni ĝian realigon en la manoj, ĉar neniu kuraĝos ĝin transpreni... ĉu tamen UEA?

Ni memorigas, ke jam ekzistas diversaj vidbendaj lerniloj: prezentita modelo de MODERNA CSEH-metoda instruado profesinivela (do ne eblas rekte instrui laŭ ĝi), mendebla ĉe Internacia Esperanto-Instituto (Riouwstr.172, 2585 HW DEN HAAG, Nederlando) por 500/250 dolaroj (pli detale vidu en IPR okt-dec. 1988, p. 31.); similkarakteraj ok model-lecionoj de la hungara ILEI-sekcio (180 minutoj, 50 gld. ĉe Pedagogia komisiono de HEA, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario, pli detale en IPR jul-sept 1988, p. 36.),100-minuta kurso ESPOLEZN por anglalingvanoj (IPR jan-mar. 1989, pp. 23-24.); 12-era serio, farita en 1982, kiu preparas al ŝtata lingvoekzameno laŭ Hungariaj normoj, tamen laŭ enhavo kaj allogeco ŝajne la plej simila al la idealo de s-ano dell'Aquila („kiam televidanto ekvidos hazarde parton da leciono, malofte forlasos ĝin kaj, male, li daŭrigos la observadon, almenaŭ pro kuriozeco kaj emo al novaĵo"). Kaj certe ekzistas pluraj video-lerniloj. Eble ne sonos „kutima senfrukta kritiko" nek pedantaĵo mencii kelkajn strangaĵojn kaj italismojn el la teksto: „Kiam tiu ĉi kurso *terminos"* (anst. „finiĝos",p. 19.), „akcepti aŭ *repeli* nian proponon" (anst. „rifuzi". p. 36.), „se tio *rezultos* eble" (anst. „montriĝos", p. 32.)

KORESPONDU KUN KRIZANTEMO

Japana Esperanta Librokooperativo el Tokio sendis **Gvidlibron de internacia korespondado por esperantistoj**, verkitan de pseŭdonima Krizantemo. Laŭkutime plaĉaspekta kun mankaresa formato, la libreto vere ŝajnas elĉerpi ĉiujn sciindaĵojn pri internaciaj leterrilatoj, de komencformuloj ĝis respondkuponoj. Eĉ spertaj kaj regulaj skribantoj trovos en ĝi praktikegajn konsilojn pri ordigado de leteroj, sendomanieroj, letera ĝentileco, ktp. Eŭropanojn speciale interesos la parto pri latinlitera transskribo de japanaj adresoj. La verketo efike helpos Viajn kursanojn kaj lernantojn je iliaj unuaj transnaciaj paŝoj. Ĉe UEA ĝi kostas 13.20 gld.

GLOSARO POR FREŜBAKITO

La Kancerkliniko pridonacis sian legantaron en la nro 52 (okt-nov-dec. 1989) per kelkaj utilaj difinoj pri E-nocioj ne tiom konataj al komencantoj. Jen areto el tiuj kapvortoj, kiuj pli rekte koncernas nian fakon:

asocio: *grupo, kies celo estas rikolti kotizojn*
dekses reguloj: *iama blago en la fundamento*
faka asocio: asocio, *kiu akceptas kotizojn el nur unu profesio*
instruanto: *kutime* instruisto, *kiu praktikas sian profesion ankaŭ hobie*
instruisto: *kutime* instruanto, *kiu praktikas sian hobion ankaŭ profesie*
instrumetodo: *ĉiam pli novas kaj efikas, kiel propagandmetodoj*
komencanto: *homo, kiu ankoraŭ ne flue klaĉas*
kultura gazeto: *gazeto, per kiu intelektuloj povas sin reciproke insulti*
kurso: *klubo por komencantaj eternaj komencantoj*
pedagogio: *malsano ade inventi novajn* instrumetodojn
pedagogo: *pedagogipato*
scienca gazeto: *gazeto, per kiu la sola fakulo pri sia fako povas publikigi artikolon. Li rajtos ĝin ankaŭ legi.*

Ni aldonu:

La Kancerkliniko: la sola E-gazeto, kiu superas la pintojn atingitajn de IPR. Tial ĝi nepre subtenindas: abonu ĝin por montri la viglecon de E-kulturo al Viaj lernantoj. Kontaktu Ĵak Le Puil, „Les Cocherats", 18210 Thaumiers, Francio.

ESPERANTO SUR LA LANGO

Kun foto de knabino kun Esp-a stelo sur la elŝovita lango, aperis ekstreme interesa studo de Blazio Vaha pri „Esperanto kiel lingvo heredata" en la pedagogia rubriko de Literatura Foiro 124, aprilo 1990. L'aŭtoro, mem patro de E-parolantaj infanoj, analizas multajn aspektojn, precipe psikolingvistikajn, de denaskismo. Temas pri lingvonivelo de denaskaj parolantoj, pri la karaktero de ilia dulingveco, pri individuaj uzoj ktp. Gravas la pripenso, ke „ne estas sensence ankaŭ konscie vastigadi la vorttrezoron de la denaskuloj. (...)ankaŭ en la etnaj lingvoj konsiderindan parton de la vortostoko oni akiras pere de la sistemeca lernado, dum la instruhoroj..." Tial Vaha preparas por la infanoj

taskfoliojn pri „tritiko, hordeo, aveno, sekalo, rizo" aŭ „aglo, akcipitro, falko, vulturo". Tasko lerniga eĉ por instruisto...

INTELEKTA INTERHELPO

„La Gazeto decidis de nun senpage publikigi la anoncetojn de siaj abonantoj, pri intelektaj priserĉadoj, libroj, fakaj artikoloj ktp." – ni legas en La Gazeto nro 28, 30-a de apr. Fakte, kial ne aliĝi al tiu iniciato? De nun ankaŭ IPR proponas tiun servon: se Vi serĉas pedagogian (aŭ ian ajn) fakverkon, artikolon, aŭ entute bezonas intelektan informon, skribu al ni. Ni publikigos Vian peton, fidante je kunlaboremo kaj helpemo de niaj legantoj. Dankon pro la ideo al La Gazeto, kiu abonindas je 139 francaj frankoj ĉe CLUB D'ESPERANTO DE METZ, MCL, 36 rue St-Marcel F-57000 METZ, Francio.

LA LIMOJ DE LA LERNEJO

Tiel subtitoliĝas februara numero de „esperanto", organo de UEA. Tre honorige, ĝi plenigas siajn paĝojn 21-25 preskaŭ nur per IPR-materialoj. Ni esperas daŭre resti tiel interesaj; helpu nin je tio.

LEGIPOVIGI

kiel eble plej da homoj estas la celo de la Internacia Alfabetiga Jaro. La ĵus menciita „esperanto" dediĉis plurajn legindajn artikolojn al la temo. En dokumentoj (haveblaj en la angla, franca kaj hispana ĉe Unité Internationale de l'Alphabétisation, Maison de l'Unesco, 7, place de Fontenoy, 75700 Paris) ni legas, ke la proporcio de analfabetoj ŝrumpis de triono de l'monda loĝantaro (komence de la 70-aj jaroj) ĝis kvarono nuntempe, sed absolute ĝi kreskis de 890 al 912 milionoj. Ankaŭ esperantistoj, kaj ĉefe pedagogoj devus klopodi plibonigi tiun situacion. Ĉu komenci legipovigon per la fonetika Esperanta alfabeto? Ĉu forigi t.n. „funkcian analfabetecon" en la propra medio, per instigo al legado? Ĉu ŝanĝi kaj aktivigi la proprajn legokutimojn? La taskoj multas kaj varias. Ni atendas ankaŭ Viajn kontribuojn pri la temo.

Enketo pri instruado 89/90:

Ĉu ni enketis sufiĉe?

Jen la rezultoj de la dua enketo de ILEI. La respondoj venis en surprize aliaj landoj ol pasintjare. Sed pluraj landoj kun multa instruado restas obstine silentaj, tiel ke ni ankoraŭ ne povas pretendi havi superrigardon aŭ prifierindan rezulton. Ni esperas, ke ĝi donos al korespondemuloj eblecon starigi bonajn ligojn por la nova instrujaro. Nia alvoko al sekcioj liveri kompletajn superrigardojn havis preskaŭ nulan efikon; nur Hungario liveris tion kaj du aliaj sendis la pasintjaran resumon.

La informoj aperas laŭ la sekva vicordo: Lando, Urbo, Lerneja nomo, Lerneja adreso, nomo de instruisto (eventuale adreso se ne estas lerneja); ĉu profesia? ĉu dungita de la lernejo, nombro de lernantoj, aĝo, oficialeco, daŭro, studhoroj entute, studhoroj semajne, ekzameno, deziro pri korespondado (IK = Individua korespondado, KK = Klasa korespondado).

Argentino

Cordoba, Kordoba E-Asocio, Avda. Caferatta 167, RA-5000 Cordoba; Atiljo ORELLANA-ROJAS; jes; ne; 5; 18–40-jaraj; 48 horoj, 3 semajne. IEl-ekzamenoj, instruo laŭ Csehmetodo.

Mar del Plata, AULEM, C.C. 163, RA-7600 Mar del Plata; Clara Pagani de MOTTA, ne, ne; 28, diversaĝaj; 60 horoj, 2 semajne; neoficialaj sed aŭspiciataj de la komunumo; ekzameno AEL; KK.

Aŭstrio

Ne okazis kursoj laŭ nia sekciestro.

Britio

York, Ampleforth College, York, YO6 4EN; Douglas KERSHAW; jes; jes; 4; 13–17-jaraj; 1 h/sem. Ĉiujara kurso.

Bulgario

Varna, 5a mezlernejo; Natalia IVANOVA, 109 bd. Lenin, ap. 13, BG-9000; jes; jes; 22+14; 14–15-jaraj; 4h/sem; sep-mar.; oficiala; sen ekzameno; KK, IK.

Ĉeĥoslovakio

Budišov N.B., Zakladni skola, Karel Dohnal, N.B. 690, CS-74787 Budišov; ne; ne; 4; 11–13-jaraj, 1h/sem; 32–40 entute. Neoficiala; sen ekzameno; Kl; bez. kantojn. Ŝercojn.

Havírov, Baza lernejo, ZS, ul. Pionirju 1/874, CS-736 01 Havirov-Sumbark; Zdenek Heiser; jes; jes; 12, 13–14-jaraj, 1h/sem; 40 jare; 4-jara kurso; sen ekzameno; KK, IK

Kladno 10.ZS; ing. Jozef KROB, Arbesova 2630 CS-272 01 Kladno-Krocehlavy; ne; ne; 18; 11–13-jaraj; 0,5 h/sem.; 60 jare; 3-jara; neoficiala; sen ekzameno; IK.

Netolice: Urba Domo de Pioniroj kaj Junularo; Jan Fidel REPA; Na Valse 250, Zápotockého ul. CS-384 11 Netolice; ne; ne; 20; 10–14-jaraj; 2 h/sem.; 70 jare; sep.–majo; ĉiujara; neoficiala; sen ekzameno; IK.

Tvrdosín: Domo de infanoj kaj junularo; Anna DVORÁKOVÁ sídl. Medvedzie 122/13–8 CS-027 44 Tvrdosín; ne; ne; 11;

8—12-jaraj; 2h/sem.; 60 jare; okt.-junio; neoficiala; sen ekzameno; IK.

Francio.

Ni ricevis resumajn informojn pri la antaŭa jaro. Funkciis 15 element-lernejaj klasoj en 11 urboj (Le Fleix, St-Pierre d'Eyraud, La Force, Servain, Charce, Pont-Saint-Vincent, Pau, Hennebont, Le Vesinet, La Barre de Monts kaj Adriers). Funkciis 14 mezlernejaj klasoj en 11 urboj (La Force, La Canourgue, Pau, Chassieur, Meyzieu, Villefranche-sur-Saone, Gray, Provins, Toulon, Le Pontet, Jouy le Moutier. Funkciis 4 liceaj klasoj en 4 urboj (Mende, Thionville, Valenciennes kaj Toulon). Universitataj kursoj funkcias en Aix-en-Provence, Clermond Ferrand, Lyon kaj Paris VIII.

Kiu volas starigi kontakton kun francaj lernejoj, skribu al la sekciestro: s-ino Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kleppchen, L-5862 Dalheim, Luksemburgio. Vidu krome la apudan anoncon.

SOMERA OFERTO EL FRANCIO!

Instruisto en centra Francio kun skolta grupo ofertas senpagan restadon al du eksterlandaj knaboj/junuloj, prefere skoltoj, inter 12- kaj 17-jaraj. Ili devas paroli Esperante kaj deziri vivi tendare en arbaro kun francaj skoltoj. La unuaj du respondantoj estos invititaj, kaj ricevos plenajn informojn. Skribu al: Pascale kaj Samuel Gaillard, 50, avenue du Livrados, F-63800 Cournon d'Auverne, Francio. Ili ankaŭ volonte korespondigas siajn skoltojn kaj enkondukas Esperanton en pluraj lernejoj pere de instruistaj kolegoj.

F.R.Germanio.

Duisburg: Gemeinschaftsgrundschule; Krefelder Str. 47. D-4100 Duisburg 14; Heinz Gerd DIESENHOFF; jes; ne; 11; 9—11-jaraj; 2h/sem. 70 jare; 1jara; neoficiala; kun ekzameno; KK, IK.

Duisburg: Gemeinschaftsgrundschule; Krefelder Str. 47. D-4100 Duisburg 14; Heinz Gerd DIESENHOFF; jes; ne; 13; 8—9-jaraj; 2h/sem. 70 jare; 2jara; neoficiala; kun ekzameno; KK, IK.

Germana D.R.

Hoyerswerda; Pionierhaus "Greta Walter"; Christel KRAUS, J.G. Herderstr. 34. DDR-7700 Hoyerswerda; jes; ne; 9; 9—15-jaraj; 2 h/sem; 120 jare; 2jara; neoficiala; sen ekzameno; IK.

Hungario

Vidu la apudan tabelon! Kontaktadresoj: HEA, H-1368 Budapest, Pf. 193. aŭ ILEI Hungara Sekcio, H-1221 Budapest, Ady E. u. 23-25/c. II/2. Aparte sendis informojn:

Eger Pedagogia Altlernejo; BALOGH Viktória; H-3300 Eger, Zalka M. u. 40.; jes; ne; 16; 19—20-jaraj; 2 h/sem.; 40; 1,5 semestroj; oficiala; kun ekzameno; IK.

Eger Pedagogia Altlernejo; BALOGH Viktória; H-3300 Eger, Zalka M. u. 40.; jes; ne; 6; 22-jaraj; 2 h/sem.; 40; 1,5 semestroj; oficiala; kun ekzameno; IK; bez. invitojn al junularaj renkontiĝoj.

Eger Pedagogia Altlernejo; BELKOVNÉ GULYÁS Rozália, H-3300 Eger, Kiss Lajos u. 5.; 18; 19-jaraj; 3 h/sem.; 180 jare; 1,5 semestroj; oficiala; kun ekzameno; IK; bez. invitojn al junularaj renkontiĝoj.

Eger Teknika Mezlernejo; KÖNCZÖL Ernő, H-3300 Eger, Sóház u. 13.; jes; jes; 15; 15—17-jaraj; 2 h/sem.; 120 jare; 2jarojn; duonofiala; kun ekzameno; IK; bez. invitojn al junularaj renkontiĝoj.

Eger Pionirdomo; KÖNCZÖL Ernő, H-3300 Eger, Sóház u. 13.; jes; jes; 13; 10—12-jaraj; 4 h/4sem.; 40 jare; 2jara; neoficiala; sen ekzameno; KK, IK; dez. kontaktojn kun aliaj pionirdomoj.

Kál Bazlernejo; HÍDVÉGI Györgyné, H-3350 Kál, Dózsa Gy. u. 16. jes; ne; 17; 10—12-jaraj; 2 h/sem.; 178 jare; 3jara; neoficiala; sen ekzameno; KK.

Tiszafüred Bazlernejo; KISHÁZI Jánosné, H-5350 Tiszafüred, Vörösmarty u. 16.; jes; jes; 10; 8—9-jaraj; 2 h/sem.; 60 jare; 3jara; neoficiala; sen ekzameno; KK.

Tiszafüred Bazlernejo; KISHÁZI Jánosné, H-5350 Tiszafüred, Vörösmarty u. 16.; jes; jes; 10; 9—10-jaraj; 2 h/sem.; 60 jare; 3jara; neoficiala; sen ekzameno; KK.

Kecskemét Katona József Gimnázium, H-6000 Kecskemét, Dózsa Gy. u. 3.; GÁBOR Gyuláné; jes; 14; 16-jaraj; 2 h/sem.; 150-160; 3jara; duonoficiala; sen ekzameno; KK, IK.

Szekszárd Bazlernejo; VEJKEYNÉ SUDÁR Sarolta, H-7100 Szekszárd, Alisca u. 22. I. 3.; ne; ne; 18; 12-jaraj; 3 h/sem.; 1 jaro; neoficiala; sen ekzameno; KK.

RESUMO DE INSTRUADO EN HUNGARIO 1989/90.

Tipo	Oficialaj kursoj	Kursoj entute	Oficialaj lernantoj	Kursanoj entute
Elementa lernejo (6—14-jaraj)	23	54	722	1158
Mezlernejo (14—18-jaraj)	10	12	415	444
Universitatoj k.s.	8	11	145	192
Plenkreskuloj (ĉeestaj kaj korespondaj kursoj)				747
Sume	41	77	1282	2541

Italio

Capurso (Bari), San G. Bosco; Nicola LASALANDRA, P.V. Veneto 21. I-70019 Triggiano (Bari); jes; jes; 25; 10—11-jaraj; 90 min./sem.; de okt. '89.; oficiala; KK, IK.

Torino Scula Media Guglielmo Marconi, Via Asigliano Vercellese 10, I-10100 Torino; Alessandro AMERIO; ne; ne; 13-jaraj; 2 h/sem.; 16; 2 mon.; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Media Pablo Neruda, Via Frattini, 15, I-10100 Torino; Alessandro AMERIO; ne; ne; 13-jaraj; 2 h/sem; 16; 2 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Media Giuseppe Baretti, Via Santhia 86, I-10100 Torino; Pierisa Cavallere CARDONE; ne; ne; 21; 12—13-jaraj; 1 h/sem.; l6; 4 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Media Giuseppe Baretti, Via Santhia 86, I-10100 Torino; Pierisa Cavallere CARDONE; ne; ne; 19; 13—14-jaraj; 1 h/sem.; l6; 4 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Elementare Erich Giachino, Via Campobasso I-10155 Torino; Pierisa Cavallero CARDONE; ne; ne; 14; 10-jaraj; 2h/sem.; 16; 2 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Elementare Erich Giachino, Via Campobasso I-10155 Torino; Carla DE LORENZI; ne; ne; 19; 10-jaraj; 4h/sem.; 16; 2 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Elementare Allievo; Via Vibo 62, I-10100 Torino; Paola DE LUCA kaj Paola NIGRELLI; ne; ne; 20; 11-jaraj; 1; 30; okt.-majo '89; oficiala; neoficiala ekz. K.

Torino Scuola Media Leonardo da Vinci, Via Abeti, 13, I-10100 Torino; Anna CIMOSSA; ne; ne; 23; 14-jaraj; 2; 16; 2 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Torino Scuola Media Leonardo da Vinci, Via Abeti, 13, I-10100 Torino; Anna CIMOSSA; ne; ne; 18; 14—15-jaraj; 2; 16; 2 monatoj; oficiala; sen ekzameno; K.

Japanio

Kawasaki-shi Sumiyosi supera mez-lernejo; 1957-4, Kizuki-sumiyosi, Nakakhra-ku, Kawasaki 211; s-ino KITAGAWAlkuko; jes; jes; 7; 15–17-jaraj; 2 horoj; ekde aprilo 1985; neoficiala; sen ekzameno; IK.

Morioka Morioka Dai-ichi Kotogakko (supera mez-lernejo); SATOO, Ŝ., Nishi-Matsuzono 4-12-8, Morioka 020-01; jes; jes; 14; 15–18-jaraj; 1; 10; duonjara; duonoficiala; sen ekzameno; KK, IK.

Okajama Sanjo virina alta lernejo; MASUMI Suzuki, Masuno-cho 262-26, Okajamashi; jes; jes; 20; 12–17-jaraj; 3 h/sem.; 50 jare; 1jara; neoficiala; sen ekzameno; IK; interŝanĝo de fotoj, muziknotoj.

Osaka Suita Daisan Shogakko (elementa lernejo), 564 Takashirocho 18–39, Suitashi, Osaka-hu; OTOTOO Sumiko; jes; ne; 12; 10–11-jaraj; 1h/sem.; 30 jare; ĉiujare ekde aprilo; neoficiala; sen ekzameno.

Jugoslavio

Novi Becej Elementa lernejo "Miloje Ĉiplic"; Agnesa SANISLO, YU-23272 Novi Bečej, ul. Sonja Marinkovic 1.; jes; jes; 15–20; 11–14-jaraj; 2 h/sem.; 60 jare; sept.-majo; neoficiala; sen ekzameno; KK. IK; dez. kunvenon kun instruistoj.

Niĝerio

Illeh Ekpoma Esperanto-Internacia Lernejo ĉe Universitato de Ekpoma; prof. d-ro Godwini SOLAR, P.o. Box 62, Ekpoma; jes; jes; 50; 12–50-jaraj; 15h/sem.; ekde jan90–91. duonoficiala; KK. * marto89; 3jara; 14h/sem.; oficiala; kun ekzameno. * 40; 18-jaraj; 1 h/tage; 1jara; neoficiala; sen ekzameno; KK, IK.

Norvegio

Bergen Bergen maritime v.g. skole, V. Stromkai 10. N-5008 Bergen; Bjorn HEGGSET; jes; ne; 20; 20-jaraj; 2 h/sem. 96 jare; 1jara; neoficiala; sen ekzameno; KK, IK; dez. viziton de eksterlanda esperantisto.

Pollando

Chelmno ZSR-Grubno; Elzbieta ABRAMOWSKA, ul. Slowackiego 2a/32; PL-86-100 Swiecie; jes; jes; 17; 15–18-jaraj; 2 h/sem.; 60 jare; neoficiala; kun ekzameno; KK, IK. Kontaktoj kun agrikulturaj mezlernejoj serĉataj.

Katowice kaj Gliwice plurloke; Alicja LEWANDERSKA, Kormoranów 19/21, PL-44-100 Gliwice; jes; 9–18-jaraj orfoj; 18–45-jaraj malliberuloj; kontinue.

Lochów Liceum Ogólnokształcace (Ĝeneralkleriga Liceo), Wieslaw STANICKI, PL-07-130 Lochów, ul. Szkolna 4.; jes; jes; 30; 15–17-jaraj lernantinoj; 1 h/sem.; 40 jare; 1jara; neoficiala; kun ekzameno; KK, IK; interŝanĝo de libroj.

Srem Baza lernejo; Eleonora WORSZTYNOWICZ, ul. Zawadskiego 12a. PL-63-101 Srem; jes; jes; 25; 10–15-jaraj; 2 h/sem.; 70 jare; ĉiujare; oficiala; kun ekzameno.

Szcsecin Elementa lernejo n-ro13. de L.L. Zamenhof, SP13, ul. Baltycka 1A, PL-70-880 Szczecin; Elizabeta KRAWIEC; jes; jes; 20; 11–15-jaraj; 2 h/sem.; oficiala; sen ekzameno; KK, IK.

Tychy Szkola Podstawowa nr.7. ul. Tolstoja 1. PL-43-100 Tychy SP-7.; Hanna KWASNIEWICZ; jes; jes; 20; 10–15-jaraj; 2h/sem.; 60 jare; neoficiala; kun ekzameno; KK.

Varsovio Studium Nauczycielskie (Lernejo por Instruistoj); Teresa JANKOWSKA, ul. Iwicka 40. m18. PL-00735 Warszawa; ne; jes; 20; 20–19-jaraj; 2 h/sem; 46 jare; oficiala; sen ekzameno; KK.

Portugalio

Aveiro Universitato de Aveiro; Jose Manuel MARTINS, Cais do Paraiso 5, P-3800 Aveiro; ne; ne; 15; 18–31-jaraj; 1 h/sem.; neoficiala; kun ekzameno; IK.

Lisbono Portugala Esperanto-Asocio; infana + aliaj tri gradoj; ĉiusabate 90 min.; 30 jare; neoficiala; K.

Sovetunio, Estonio

Viljandi I-a Mezlernejo, 202 900 Viljandi, Pk. 82.; s-ro Rein SAAG; ne; jes; 12; 14–16-jaraj; 2 h/sem.; 68 jare; oficiala; neoficiala ekzameno; * div. kursoj por 54 plenkreskuloj.

Tallinn 43. Keskksol, 200 013 Tallinn, Käo 21; Helja LAINJARV; jes; jes; 6; 16–17-jaraj; 1 h/sem.; 35 jare; 1jara; hobia; sen ekzameno; K.

Tallinn Tallinna Õpetajate Maja; Johannes PALU, Sõlme 21, 200 016 Tallinn; jes; ne; 10; 14–15-jaraj; 2 h/sem.; 60 jare; hobia; sen ekzameno; K. * Tallinna 44. Keskkool; J. PALU; 17; 10–11 jaraj; 1 h/sem.; 70 jare; 2jara; fakultativa; sen ekzameno; K. * Tallinna 10 Keskkool; J. PALU; 11; 13–14-jaraj; 1 h/sem.; 25–30 jare; kluba; sen ekzameno; K. * Tallinna 44. Mezlernejo; J. PALU; 12; 12–13-jaraj; 1 j/sem.; 30–35 jare; fakultativa; sen ekzameno; K. * Tallinna 44. Mezlernejo; J. PALU; 18; 14-jaraj; 1 h/sem.; 32–35 jare; deviga; sen ekzameno; K.

Kehra Mezlernejo; Fred NEEME, Kooli 6–26, 202 240 Kehra; ne; jes; 7; 12-jaraj; 1 h/sem.; 64 jare; ekde okt.89. 2jara; nedeviga; kun oficiala ekzameno; K.

Märjamaa Mezlernejo; s-ino Tatjana ANANJEV, Välja 4/16. 203 521 Märjamaa; jes; jes; 20; 10–12-jaraj; 1 h/sem.; 70 jare; ekde sept.89; 2jara; hobia; ne oficiala ekzameno; K.

Haapsalu Sanatoria Internatlernejo; s-ino Eevi LOBJAKAS, p/k. 52. 203 170 Haapsalu; ne; jes; 9; 18-jaraj; 2 h/sem.; 80 jare; ekde nov.88. 2jara; hobia; sen ekzameno; dez. k.

Kaisma 9-klasa lernejo; s-ro Ilmar PERANDI, 203 469 Kaisma, Pärnu rajoon; jes; jes; 15; 10–14-jara; 2,5 h/sem.; 170; ekde okt.89; 2jara; nedeviga; sen ekzameno; K.

Kose Kose Keskkool (Mezlernejo), 203 040 Kose, Harju rajoon, Kehra mnt. 3–4.; s-ino Aime SAARKOPLI; jes; -; 26; 11–16-jaraj; 2 h/sem.; 33 jare; hobia; ne oficiala ekzameno; K.

Törva Lernejo de Patküla, 202 532 Törva, Metsa 2–2; Ants PRULER; ne; ne; 3 13–14-jaraj; 2 h/sem.; ekde okt.89.; 7 monatoj; nedeviga; sen ekzameno.

Rakvere Mezlernejo n-ro 3., 202 100 Rakvere, str. Lanristini 67.; s-ino Reet TREIAL; jes; jes; 15; 10–11-jaraj; 2 h/sem.; 60 jare; nedeviga; sen ekzameno; K.

Pärnu Lernejo de Taali, 203 600 Pärnu, Karusseli 93-86; Vaike BIRK; jes; jes; 5; 9–14-jaraj; 1–2 h/sem.; 70 jare; 2jara; hobia; sen ekzameno; K.

Kohtla-Järve 1-a mezlernejo. 202 020 Kohtla-Järve 8, Katse str. 2.; Lehho JOUMEES; jes; -; 4; 17–18-jaraj; 1 h/sem.; nedifinita; 3jara ĝis majo90; hobia; sen ekzameno.

Kohtla-Järve Jõhvi 1. Lernejo; Kristi KLAAMANN, Kohtla-Järve 11, Lev Tolstoi 5–3.; jes; jes; 15; 13-jaraj; 2 h/sem.; 66 jare; ekde sept.89. 2 jara; hobia; sen ekzameno.

Sovetunio, Litovio

Balninku vid. Mokykla; laimuté PACEVICIENÉ, Balninku, Moletu rajonas; jes; jes; 20; 1 h/sem.; fakultativa; kun ekzameno; bez. lernolibrojn.

Kursénai Mezlernejo n-ro 4.; Fokaite Antanina, K. Pozelos 22, 235 420 Kursénai; jes; ne; 15; 15–17-jaraj; 1 h/sem.; 105; ekde sept.89.; 3 jaroj; duonoficiala; sen ekzameno; sen ekzameno; IK; dez. kontakti geinstruistojn.

Klaipéda domo de gelernantoj; Vilija Jakŝtienė, 235 802 Klaipéda, p.d. 429 Puodziu 1.; jes; ne; 21; 10–17-jaroj; 4 h/sem.; duonoficiala; kun ekzameno; IK; bez. lernolibrojn, int. renk.

Kaunas Maironio mezlernejo; Elvyra KAKLAUSKIENE, 233 008 Kaunas, Ariogalos 19-2; ne; -; 8; 14–16-jaraj; 2 h/sem.; 72 jare; duonoficiala; sen ekzameno; IK.

Jonava Kulturdomo de "Azotas", Jonava, Leuniy 15; Launa KRIVICKIENE; ne; jes; 12; 10–17-jaraj; 90 minutoj; 24 lecionoj; neoficiala; kun ekzameno; KK, IK; dez. grupajn interŝanĝojn.

Aniksciai Distrikta Kultura Palaco; Algimantas SUDEIKIS, 234 180 Jamušava, Aniksciai raj. p/s. Kavarskas; ne; ne; 14; diversaĝaj; 12o min/sem.; 32 h/jare; neoficiala, kun ekzameno; IK; bez. lernolibrojn.

Vilkaviskis Klubo "Tulipo"; Jonas LEBETKEVICIUS, 234 270 Vilkaviskis, Piolimino 13–24.; jes; ne; 12; diversaĝaj; 2 h/sem.; 48 jare; neoficiala; kun ekzameno; IK; bez. lernolibrojn.

Jomiskis Mezlernejo n-ro 3; Irena RAMONIENE, Joniskis, Meĝotoju 9–6. jes; -; 10; 14-jaraj; 1h/sem.; 35 horoj; fakultativa; kun ekzameno; IK, KK; bez. lernolibrojn por komencantoj.

Marijainpolis SRUOGINYTÉ Daiva, 234 503 Marijainpolis rej., Antanavo poŝtas, Antanavos, Kapsuko 66. jes; ne; 12; 10–15-jaraj; 2 h/sem.; 40 jare; fakultativa; kun ekzameno; IK.

Maĵcikej 5-a mezlernejo; ?; Maĵcikej, Viduno 6. jes; 16; lernantoj kaj plenkreskuloj;

5 h/sem.; neoficiala; kun ekzameno; IK, KK; dez. ppreni int. tendarojn.

Ŝvekŝna Mezlernejo; ČELIAUSKAS Petras, 235 745 Ŝvekŝna, Sodo 2—4; jes; jes; 16; 12—17-jaraj; 80 min/sem.; 50 jare; fakultativa; sen ekzameno; KK.

Jurbarkas 1-a mezlernejo; Antanas GVILDYS, 234 430 Jurbarkas, box 41.; jes; jes; 30; 13—16-jaraj; 2 h/sem.; 70 jare; fakultativa; fakultativa ekzameno; IK, KK. * 2-a mezlernejo; A. GVILDYS; 10; 14—16-jaraj; 2 h/sem.; 70 jare; neoficiala; fakultativa ekzameno; IK, KK.

Snieckus 6-a litova mezlernejo; Henrikas Pierniuta Leono, Ignalina distr. Snieckus, str. Sttybininku 11-11.; ne; ne; 11; 15—17-jaraj; 1 h/sem.; 30 jare; libervola; kun ekzameno; KK, IK.

Pasvalyk Kulturdomo; Blauzdziuniene Nijole, 235 250 Pasvalyk, Jaikos 13—8.; ne; kaj Aulistikalmene Brone, 235 250 Pasvalyk, Zanonio 27; jes; 15; diverağaj; 38 horoj; kun ekzameno; IK; bez. lernolibrojn.

Marijampolé Mezlernejo; Merijanskiene Janina Juoro, 234 520 Marijampolé, Z. Akganirio 88-9.; Jes; 23; 9—17-jaraj; 4 h/sem.; fakultativa; kun ekzameno; KK, IK; bez. instruprogramon. * en alia mezlernejo kun sama instruistino: 15; 14—17-jaraj; 3 h/sem.; fakultativa; kun ekzameno; IK. KK.

Marijampolé 5-a mezlernejo, Vidrinskiene Danute Jano, 234 520 Marijampolé, Basanavicrausa 5-10; jes; 13; 14—16-jaraj; 2 h/sem.; neoficiala, kun ekzameno; IK.

Panevézys Velzysa mezlernejo; Lukoševičiene Palmira, 235 306 Panevézys, Radastu 22—2. Jes; 8; 15—17; 120min/sem.; 52 jare; fakultativa; kun ekzameno; IK.

Psavalys Vitartu 9-te mokykla; Aukstikalniene Brone, 235 250 Pasvalys, Janonio 27.; jes; jes; 13; 13—14 jaraj; 80min/sem.; 72 jaraj, oficiala; kun ekzameno; IK; bez. lernolibrojn kaj atestojn.

Sovetunio

Volgograde E-klubo "Kamomilo"; Jelena MAKSIMOVA, 400 005 Volgograd, av. Lenin 97.; ne; ne; 10; diversağaj; 10 taga kurso kun 20 lecionoj; kun ekzameno; K.

Tobolsk 9-a lernejo; Dilara GADIROVA, 626 100 Tobolsk, ul. Semakova 4/8. jes; jes; 20; 8—9, 12-jaraj; 1 h/sem.; 32 jare; fakultativa; kun ekzameno; IK; dez. lernolibrojn, metodikan literaturon, instruhelpilojn.

Baku Urba mezlernejo N160; Akif MIRZOJEV, ul. Aga-Nejmatulla, 22 kv.23, Baku-145, 370 145; ne; ne; 6; 14-jaraj; 1 h/sem.; 50 jare; neoficiala; sen ekzameno; IK, KK; bez. kontaktojn, metodikajn librojn.

Svedio

Karlskoga Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-69124 Karlskoga; Lars FORSMAN; jes; jes; 10—15 diversağaj studentoj en ĉiu kurso; unu- kaj oksemajnaj kursoj al svedoj kaj eksterlandanoj; oficialaj; sen ekzameno.

Usono

Vidu la apudan tabelon por la jaro 1988/89 11 el la kursoj estis oficialaj kaj donis al la kursanoj kreditoj. Kontaktadreso: Charlotte Kohrs, 3876 Belmont Ave, San Diego, CA 92116.

RESUMO DE INSTRUADO EN USONO 1988/89.

nivelo	plenağuloj		junuloj, infanoj		kursanoj entute	
	aliĝis	finstudis	aliĝis	finstudis	aliĝis	finstudis
elementa	127	105	69	55	196	160
progresinta	44	42	5	4	49	46
supera/metodika					44	43
Entute					332	249

ANALIZO DE LA REZULTOJ

Ni ricevis respondojn el 14 landoj, kiuj raportas pri 166 kursoj kaj 3790 kursanoj. Pasintjare ni rikoltis 275 kursojn kun ĉ. 4525 lernantoj, sed pluraj malfruaj respondoj venis post tio. Se ni komparas la rezultojn de la du jaroj, ni trovas, ke iuj kursoj estis reraportitaj, sed signifa kvanto estis unuafoje raportitaj. Se ni rigardas ambaŭ jarojn, supozante, ke la kursoj en la pasinta jaro ripetiĝas en la nuna jaro sed plejparte ne estis raportitaj, ni atingas sumon de proks. 5400 lernantoj en sume 23 landoj laŭ la suba skemo:

	1988-89	1989-90	*SUME*
Argentino	2, 33	2, 33	—
Aŭstrio	—	—	—
Belgio	4, 31	—	4, 30
Brazilo	2, 56	—	2, 55[1]
Britio	6, 35	1, 4	6, 35
Bulgario	1, 25	—	1, 25[2]
Ĉeĥoslovakio	5, 70	5, 65	9, 125
Ĉinio	1, 269	—	1, 270[2]
Finnlando	1, 4	—	1, 5
Francio	33, 300?	—	33, 300[3]
Germanio	2, 47	3, 33	5, 80
Hungario	156, 2551	77, 2541	77, 2550
Italio	6, 110	10, 200	16, 310
Japanio	—	4, 53	4, 65
Jugoslavio	28, 340	4, 53	28, 340
Luksemburgo	1, 7	1, 20	1, 10
Nederlando	7, 23	—	1, 20
Niĝerio	3, 90	3, 90	
Norvegio	1, 20	1, 20	
Pollando	10, 172	7, 110?	17, 280
Portugalio	3, 15	5, 15?	5, 20
Sovet-Unio	10, 146	—	45, 600[4]
Estonio	—	18, 188	—
Litovio	—	19, 267	—
Cetera	—	3, 36	—
Svedio	5, 65	5, 65	5, 56
Svislando	1, 10?	—	—
Usono	20?, 249	—	20, 250
SUMO	275, 4525	166, 3790	287, 5425

1. = devus esti pli — 2. = devus esti miloj — 3. = verŝajne pli — 4. = miloj pli

ILEI LABORTABLE

Post la februara estrar-kunsido pluraj sekvaj paŝoj estas entreprenitaj:

- Post kompletigoj kaj ellaboro de detaligoj, la kontoj por 1989 estas pretaj kaj aperas en ĉi tiu numero de IPR.
- Enketilo estas dissendita al ĉiu Landa Sekcio por ke ni havu aktualajn informojn en nia Konferenco. La respondoj revenas tro malfrue por aperi en ĉi tiu numero de IPR.
- Teksto de interkonsento kun UEA estis re-reviziita post diskutoj en la CO de UEA kaj dissendita al nia komitato kune kun voĉdonilo pri ĝi kaj pri la propono aliĝi al UEA kiel Faka Asocio.
- Propono de regularo por la supera nivelo de la ekzamenoj de UEA/ILEI estis verkita, diskutita en KCE kaj aliloke kaj post modifoj dissendita al la Estraro de ILEI kaj la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) por pritrakto. Se ili aprobos ĝin, UEA estos petata distribui ĝin al sia Komitato por akcepto.
- En KCE aprile estis kreita proponata listo de devigaj kaj rekomendataj libroj prepare al la elementa kaj meza ekzamenoj de UEA/ILEI, kiu formos la bazon de la deviga listo por la supera nivelo. Tiun proponon prikomentis pluraj kompetentuloj diverslande, post modifoj ĝi baldaŭ eldoniĝos ĉe KCE.
- Laŭ instigo de KCE, la prezidanto de ILEI subskribis formalan leteron direktitan al la instancoj de la kantono Neuchatel, kie situas La Chaux-de-Fonds, emfazante la gravecon de la kunlaboro inter ILEI kaj KCE pri la starigo de internaciaj ekzamenoj kaj aliaj projektoj. Tio celas helpi akiri oficialajn apogojn por tiu laboro kaj specife peti la kunvokon de interregistara konferenco pri la instruado de Esperanto, laŭ la modelo de la du jam okazintaj konferencoj organizitaj en Svislando de Edmond Privat. La oficialigo de la ekzamenoj estos unu el la celoj de tia konferenco.
- Cirkulas revizio de la Statuto de ILEI, laŭ la diskutoj en la kunsido surbaze de la projekto petita de s-ro Oene Hoekstra el Nederlando. Post dumsomeraj traktoj ni aperigos la tekston en IPR.
- Du pliaj kandidatoj sukcesis en la aprila ekzamena sesio en KCE kaj same du en sesio en junulara paska renkontiĝo en Nederlando. Pri sesio petita en Kastelo Grésillon ni ne havas informojn ankoraŭ.

Redaktoro aktive subtenas la laboron de ILEI

Nu, se ne la laboron, almenaŭ la labortablon. Labortabloj de ILEI estas kelkaj, sed tiu aludita en la supra titolo estas tiu en Budapeŝto, kaj ni devas diri, ke ĝi estis lastatempe aktive subtenata de la redakcio de IPR. Pli ĝuste dirite, de la redaktoro, kiu aktive subtenis unu ĝian finon, dum ĝia posedanto la alian, en ŝvitiga klopodo levi ĝin al tria etaĝo.

Tiu labortablo trifoje en la lastaj monatoj suferis similan sorton kaj per sia pezo suferigis portantojn. Ĝi mem nun loĝis en kvar el la dudek du kvartaloj de la ĉefurbo; espereble ĝi nun trovis fiksan lokon kaj la laboro farata sure povos ekde aŭgusto preni pli glatan kaj intensan ritmon. Unu bedaŭrinda aspekto de la lasta translokigo estas raportita sube.



Vicprezidanto reeliras la mondon

Nia vic-prezidanto, Stefan MacGill, anoncas la malakiron de hejma telefono, kio povos malrapidigi estraran kaj ligan laboron konsiderinde. Nome, la numero anoncita en numero 89/4 jam ne funkcias, kaj fakte neniam bone funkciis.

For la internaciismon!

Nia estrarano d-ro Till Dahlenburg anoncas ne adreŝanĝon sed stratnomŝanĝon. Lia strato perdas siajn internaciajn nuancojn kaj reprenas agrikulturajn. Nome oni revivigis la antaŭan nomon (la numero restas senŝanĝa): Feldstrasse 13.

En la meteologion!

Agrikulturajn sed pli precize meteologiajn ligojn havas la nova loĝloko de la supre menciita vicprezidanto: Eső u. 7 III, H-1034 Budapest. Nome *Eső* estas hungara por *pluvo*. Almenaŭ ĝi estas mallonga (kaj la nomo kaj la strato), eĉ se ĝi havas du vermojn (certe la nomo, kaj eventuale eĉ la strato.) Nu, vermoj ŝatas la pluvon. Leteroj senditaj al la malnova adreso ne perdiĝos.

LERNU KAJ INSTRUU VIVI EN PACO

Mike SADLER

Laŭ tiu devizo kongresis en Budapeŝto 300 „Instruistoj-por-Paco" el 38 landoj dum Pentekosto. Laborlingvo estis la angla kaj pli ol duono de la partoprenantoj venis el ĝermanlingvujo.

Plenkunsidojn (en iama sidejo de komunista partio) alparolis reprezentantoj de Gorbaĉov, UNESCO kaj diverskontinentaj universitataj kaj pacorganizaj moŝtoj.

Dufoje tage okazis 3-horaj laborgrupoj (kutime pli ol dudek samtempe) laŭ kvar kategorioj:

l. Malarmado;

2. Kunlaborado, solvado de konfliktoj, imagoj de malamiko kaj amaskomunikiloj;

3. Komunaj kaj individuaj rajtoj kaj liberoj;

4. Ekologio kaj medio.

Traktiĝis pli ol cent temoj: de „interreligia orfejo en Hindio" al „Eŭropa hejmo", de „ekologia vivstilo en lernejo" al „influo de instruista sindikato". Prezentoj okazis ankaŭ stande dum „pac-bazaro", kie min impresis mondmapo da „amikec-lernejoj", kiuj ĝemeliĝas kun du aliaj – unu en najbara kaj unu en fora lando.

La interkona festo konsistis el bufedo kun cigana muziko (50 seĝoj por 300 partoprenantoj). La duan vesperon packantis 15 diversaj korusoj, kaj la kongreso oficiale fermiĝis la trian vesperon per rezolucio subtene la UNan konvencion pri Rajtoj de Infanoj.

Okazis multo – mi tamen limigas mian pluon al kelkaj frazoj, kiujn mi notis tie, kie mi hazarde ĉeestis.

Komence de la 70aj jaroj libre prezentiĝis du kvarpaŝaj perspektivoj por la sekvaj 40 jaroj da monda estonteco. Laŭ la negativa, pliigo de internacia streĉo kondukas al senespero, katastrofo kaj fina neniiĝo. La pozitiva antaŭvidis kreskon de „konsciiĝo", pro kiu sekvu aktivado poste transformado al harmonio.

Nu, ni optimismu singarde – en 1987 ĉefpolitikistoj de nia mondo kunproduktis la gvidilon „Nia komuna estonteco", kiu inkluzivis la koncepton de „daŭrigebla disvolvado" de la tria mondo, per kiu oni antaŭvidas iompostioman riĉigon, kiu malsupren „gutu" al la malriĉa plebaro. Sed, difinante grandan parton de la mondo per la nure ekonomia termino „tria mondo", ni ignoras ties historion, kulturojn kaj tradiciojn, trudante tian disvolviĝon, per kiu la „unua mondo" restas daŭre kaj danĝere pli potenca kaj riĉa. Por plilarĝigi la gamon de poitike akcepteblaj solvoj ni nepre ankaŭ en lernejoj diskutu aliajn vidpunktojn kaj estontecojn, ekzemple ke unuamondanoj povus malpliigi sian materialan vivnivelon sen perdo de feliĉo.

Ni emas nomi Sud-Amerikon „kontinento kun estonteco", sed ni iom pripensu, kiel eblas ŝanĝi la nunan mizeron por ebligi tian futuron.

Instruado pensiga, respekta kaj justa estas pacinstruado. Ni kunfestu nian kulturan, muzikan, arkitekturan heredaĵon – la ĝojojn de nia komuna homeco.

Ĉiuj 7 partoprenantoj de la laborgrupo „Esperanto – lingvo de paco" iam lernis Eon. La prelego kaj iom verdisma babilado okazis precipe E-lingve.

Skandinavaj instruistoj kaj lernejanoj prezentis per diskuto, filmo kaj ekspozicio la jaron, kiun ili dediĉis al preparado, vojaĝo, reciproka akcepto kaj publikigado de la projekto NEXT STOP – SOVIET, konata al e-istoj pro partopreno de danakcenta rokmuzikisto.

La organizo „Tergloba zorgo por pli bona mondo" disvastigas senpagajn klasĉambrocelajn libretojn, kiuj enhavas pensigajn bildojn, kunlaborigajn ludojn – kaj instigojn al infanoj imagi sin mem, siajn interrilatojn kaj la medion en „perfekta mondo", kun instrukonsiloj.

Laborgrupo pri „kreivaj respondoj al konfliktoj" allogis pli ol 40 partoprenantojn. Jen kelkaj ideoj el ĝi:

Konflikto estas neevitebla pro diverso de bezonoj kaj celoj. Oni ofte edukas, ke konfliktojn solvu aŭtoritata figuro – patro, instruisto, estro, juĝisto, kaj ke manke de tiu la plej forta „gajnos" kaj la malforta „malgajnos". Sed prefere ni serĉu „gajno–gajno" solvojn„ kiuj pli bone influos la homojn kaj socion.

Desegnebla „glacimonto" proponas, ke la problemsolvado, videbla je la surfaco, baziĝas je triobla subsurfaca bazo:

ESTIMADO – agnosko, ke vi kaj aliaj homoj estas esence valoraj (senkonsidere viajn sentojn pri iliaj vidpunktoj kaj agoj, t. e. apartigi la homon de la problemo). Nepras difini la problemon en vortoj akcepteblaj al ĉiuj.

KOMUNIKADO – laŭeble klare, sincere kaj senagrese parolu – disapartigante faktojn, vidpunktojn kaj sentojn. Atente kaj senjuĝe aŭskultu.

KUNLABORADO – surbaze de la supraj kunlaboru por la komuna celo, la plibonigo de la situacio.

Aliaj utilaj teknikoj estas priskribado de sentoj, kaj rolludado, dum kiu partoprenanto ludas siajn „kontraŭulojn".

Konsiderante la universalan problemon de gefila vespera hejmenveno – esence demando de fido – oni proponis kiel eksolvon, ke dum unu semajno la junul(in)o mem antaŭdiru hejmenvenan horon.

Mi finu citante du ag-instigajn diraĵojn: „ni aŭ gajnos nian estontecon aŭ ni meritos ĝin" kaj „iuj diras, ke ili povas fari ion, aliaj diras, ke ili ne povas fari ion – ambaŭ pravas".

LA CSEH-METODO POR INFANKURSOJ

DE MARGARETE SAXL

LA demando: kiel gvidi Esperanto-kursojn por infanoj? Okupis min jam tuj post mia Esperantistiĝo antaŭ ok jaroj. Tiam mi ankoraŭ instruis fremdajn naciajn lingvojn en Berlino.

Ankaŭ en mia alilingva instruado mi preferis la rektan metodon—do sen uzo de la gepatra lingvo. Mi ĉiam konstatis, ke laŭ ĝi la gelernantoj lernas pli rapide pensi kaj paroli en la lingvo lernata. Pleje mi aplikis en mia lingva instruado la konatan Berlitz-metodon. Ĝi estas uzebla nur por plenkreskuloj.

Por Esperanto-kursoj al infanoj ekzistas pluraj rekt-metodaj lernolibroj. Kelkaj el ili estas tre praktikaj kaj allogaj por infanoj. Sed preskaŭ ĉiuj tute sensisteme kompilas la instruotan materialon. Ili miksas tre malfacilajn partojn inter la facilaĵojn de la komenco kaj uzas multajn antaŭe ne pritraktitajn vortojn. Tiamaniere la traduko en la gepatran lingvon fariĝas neevitebla, eĉ absolute necesa. Sed ĉu tiam oni rajtas paroli pri "rekta metodo"?

Feliĉaj estas ni Esperantistoj, ĉar ni jam posedas metodon, kiu evitas la jus menciitajn malbonaĵojn, nome: **la Cseh-metodon.**

La Cseh-metodo en si mem estas treege taŭga por infanoj. Laŭ lernolibro—ĉu rektmetoda aŭ nerekta—oni neniam povas atingi tion, kion donas la Cseh-metodo: tute sisteme, laŭorde kaj konsekvence konduki la lernantaron de unu punkto al la alia, gradigi la instruotan materialon sentrue kaj seninterrompe, meti brikon post briko—ĝis kiam la tuta domo estas preskaŭ preta.

Unu el la sekretoj de la sukceso en la Cseh-kursoj konsistas en la gaja atmosfero, kiun la instruisto povas krei, kaj kiu rezultiĝas el la agrabla konversacio inter instruisto kaj lernanto pri aferoj, kiuj tuŝas la animon de la kursanoj; pri iliaj ĉiutagaj interesoj tiu flanko de la Cseh-kurso multe allogas ankaŭ la infanojn. Tamen la instruisto devas esti pli severa en tiaj kursoj ol en kursoj por plenkreskuloj. La gajeco de la feliĉaj infanoj ofte ne konas limojn, kaj la instruisto devas fari grandan streĉon, por teni la disciplinon.

En mia naskiĝurbo Berlino mi gvidis ok kursojn por infanoj kaj gejunuloj. Ili ne estis "puraj" Cseh-kursoj, ĉar tiam mi ankoraŭ ne tre bone konis tiun metodon. Dum mia kvarjara eksterlanda agado mi gvidis kvar Cseh-metodajn infankursojn. Do entute mi instruis en **12 kursoj por infanoj.** En ili partoprenis geknaboj de **12-14 jaroj.** Preskaŭ ĉiuj vizitis la elementajn lernejojn kaj ne sciis aliajn lingvojn. Mirinde estas, ke tiuj infanoj dum 4–5 monatoj—eĉ en la printempo—oferis sian ununuran liberan posttagmezon, por **senescepte** kaj nedevige veni al la Esperanto-kurso. En la pasinta jaro partoprenis en mia kurso en Leeuwarden (Frislando) 40 geknaboj. Dum la oficiala finleciono, kiun ĉeestis i. a. ĵurnalistoj, delegitoj de diversaj instruistaj organizajoj kaj la instruskabeno, montriĝis, ke la infanoj en la daŭro de kvar monatoj faris bonegajn progresojn.

En mia nunjara infan-kurso en la sama nederlanda urbo (Leeuwarden) ĉe la fino de la unua kursduono mi aranĝis malgrandan ekzamenon skriban kaj buŝan. La rezulto estis tre gojiga. Nur unu el la 26 partoprenintoj montris nesufiĉan scion pri la lernita materialo; 17 atingis bonajn poentojn kaj 8 gajnis premietojn pro tre bona rezulto. La taskojn kontrolis ne nur mi sed aliaj geinstruistoj. Ĉe la kursfino la infanoj faros la duan ekzameneton.

Volonte mi aldonas ĉi tie kelkajn konsilojn rilate al la gvidado de Cseh-metodaj infankursoj:

1. **Ne daŭre apliku la ĥoran respondadon!** Limigu ĝin! **Tre ofte** faru al la infanoj apartajn demandojn!
   La komuna respondado certe estas bona ankaŭ en infankursoj, ĉar ĝi kuraĝigas la timemulojn. Sed ĝia troa aplikado provokas petolemon kaj malgrandigas la atenton de la infanoj.
2. **Kantadu** kun la infanoj! En ĉiuj landoj ili tre ŝatas tion. Jam en la unua leciono ili povas lerni la simplan ĉen-kanton, konsistantan el nur tri vortoj: "Esperanto, Esperanto, vivu ĝi, vivu ĝi!"
   Poste vi povas preni simplajn infan-kantojn kun konataj melodioj. Ekzistas de nederlanda samideanino verkitaj kantetoj adaptitaj al la kursaj vortoj.
3. Kelkfoje aranĝu **ludetojn** en la paŭzo aŭ ĉe la fino de la leciono. Modelojn vi trovas en la libro: *Gajaj Vesperoj* de Carl Walter.
4. Rakontu al la infanoj pri la vivo en aliaj landoj, pri la edukado de samaĝuloj tie, pri la disvastiĝo de Esperanto inter la junularo!
5. Post dumonata instruado vi povas jam instigi la infanojn al **korespondado** kun gesamideanetoj en diversaj landoj. Metu anoncon en la Esperanto-gazetaron kaj aranĝu letertagon!

En ĉi tiu somero oni faris en Nederlando interesan eksperimenton: kelkaj frisaj geknaboj, kiuj partoprenis en mia infankurso, per tre malmultekosta aŭtobusa karavano vizitis siajn gekorespondantojn en Danujo, dum danaj infanoj venis al Frislando. Ambaŭflanke ili estis kore kaj gastame akceptataj en la samideanaj hejmoj. Ili ĝuis neforgeseblan libertempon, el kiu ili ĉiurilate multe profitis.

Tian **infanintersanĝon,** kiun multaj lernejoj diverslandaj jam de pluraj jaroj sukcese aranĝas pere de la germana, franca, angla lingvoj, **la tutmonda Esperantistaro devus grandskale organizi por la Esperanton lernantaj infanoj.** Espereble forta internacia Esperanto-organizaĵo sukcesos solvi tiun problemon iam.

Certe ĝi estas grava, ĉar per tia infanintersanĝo Esperantista ni povos montri al niaj kontraŭuloj la praktikan valoron de nia afero por la junularo.

Per la Esperanto-instruado al infanoj multaj perspektivoj malfermiĝas antaŭ ni; perspektivoj, kiuj montriĝos benportaj kaj fruktodonaj.

Tial ni aranĝu kiel eble plej multajn kursojn por infanoj. Ni eduku nian junularon en la vera senco de interpopola amo, paco kaj harmonio! Ni faru nian eblon, por ke la infanoj de la tuta mondo ekkonu sin reciproke.

Ĉar konsciu pri tio: La infanoj de hodiaŭ estas la respondecaj ŝtatanoj de morgaŭ!

Kvankam la aldonita artikolo estis verkita antaŭ 52 jaroj tamen ĝia enhavo estas daŭre aktuala. M.Saxl estis konata Cseh-instruistino, do iom post iom da historio kun akutalaj konsiloj povus esti interesa ne nur por E-instruantoj de infanoj.

Laŭ informoj de Svisa Radio Internacia Esperanto-redakcio Bern, baldaŭ aperos biografio de M. Saxl prilaborita de E. Borsboom.

Mila van der Horst-Kolinska

TEJO-PSEK SEMINARIO POR AKTIVULOJ

En aprilo 1991 (inter la 3-a kaj 7-a) apud la pola urbo Zielona Góra Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK) okazigos denove seminarion por junaj Esperanto-aktivuloj. Dum kvar tagoj homoj aktivaj je loka, landa aŭ internacia nivelo prelegos, diskutos kaj interŝanĝos spertojn pri sia Esperanto-agado. Oni antaŭvidas traktadon de temoj el la jenaj kampoj: gazetara kaj publikrilata informlaboro, instrumetodoj kaj organizado de kursoj, gvidado, organizado de renkontiĝoj, Esperanto-gazetoj, financo, eksteraj rilatoj je loka nivelo. La planita intensa laboro okazos ĉe la ĉevalejo Raculka en arbaro kaj ĝin akompanos distra programo. La organizantoj (Jurek Rzadzki, Torsten Bendias, Lu Wunsch--Rolshoven) alvokas sendi proponojn al Torsten Bendias, Esperanto-Asocio, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, GDR 1080.

FINANCA RAPORTO DE ILEI 1989

RIMEDOJ	SEK	KOSTOJ	SEK
Membrokotizoj	26.706,59	Eldonoj	15.326,47
Libroj, filatelaĵoj	507,88	IPR	29.302,47
Koleghelpa konto	1.165,00	Bankkostoj	330,00
Fondaĵo Szerdahelyi	224,01	Afranko, telefono	3.450,71
Konferenco	1.731,61	Presaĵoj, fotokopioj	5.561,28
Kompenso de UEA 88/89	6.440,00	Ekzamensesioj nete	386,35
Kompenso UEA 89/90 (parto)	4.186,00	Dua Metodika Kurso	294,56
Bonhavo 74a UK	231,84	Koleghelpa konto, memb.	360,00
Rentoj	9.748,41	Estraro	1.288,00
		Al koleghelpa konto	805,00
		Al Fondaĵo Szerdahelyi	224,01
SUMO	50.941,34		
Malgajno	6.387,51		
	57.328,85		**57.328,85**

AKTIVO	1988-12-31		1989-12-31
En kaso	14,15		1.625,70
Banko SE	82.623,31		82.932,71
Handels	3.611,20		775,20
Frosta	8.279,55		9.309,54
Poŝtĝiro	10.642,60		1.090,85
UEA, ilek-a	5.652,70	(3133,70gld)	10.027,84
Librostoko	—		6.850,00
Stoko de filatelaĵoj	—		500,00
Nepagitaj fakturoj	—		304,00
	110.823,51		**113.415,84**

PASIVO			
Ĉe KCE por ekzamenoj	—		278,15
Koleghelpa konto	—		805,00
Fondaĵo Szerdahelyi	—		224,01
Propra kapitalo	110.823,51		112.108,68
	110.823,51		**113.415,84**

Ĉiuj sumoj en svedaj kronoj (SEK)

Bertil Andreasson, kasisto de ILEI

DETALIGO DE TRI RUBRIKOJ (ĉiuj sumoj en svedaj kronoj)

IPR (kompostita en Budapeŝto ekde 3/88, presata en Antverpeno)

Rubriko	*3/88*	*4/88*	*1/89*	*2/89*	*Entute*
Presado	3.622,87	3.717,68	3.745,76	3.745,76	14.832,07
Represo		706,92			706,92
Grafika laboro	173,32	162,34			335,66
Kompostado	972,00	972,00	972,00	972,00	3.888,00
Ekspedoj	740,12	726,38	735,97	735,97	2.938,44
Afranko	1.962,56	1.862,40	1.656,61	1.415,56	6.897,13
Anonco		– 295,00			–295,75
SUMO	6.498,87	6.879,97	6.138,34	5.897,29	29.302,47

Ekzamensesioj (nemenciitaj financis sin sen tuŝi la kontojn de ILEI)

Nomo	*Enspezoj*	*Elspezoj*	*Ĉe KCE*	*Por ILEI*
La Chaux-de-Fonds	834,45	556,30	278,15	
San Francisko	1.179,00	786,00		393,00
Kerkrade	351,80	197,00		154,80
UK, Brajtono	1.164,10	1.083,56		80,54
Diplomoj (kompostado/presado)		1.014,69		–1.014,69
SUMO	3.529,35	3.637,55	278,15	– 386,35

Eldonaĵoj

Nomo	*Elspezoj*	*Enspezoj*	*Rezulto*	*Stokvaloro*
'Glotodidaktikaj...'(Szanser)	7.524,83	—	–7.524,83	480,00
'L valeur...' (Symoens)	5.427,00	313,15	–5.113,85	4.341,60
Aliaj (ĉefe ekzamena gvidilo)	3.923,46	1.235,67	–2.687,79	2.036,00
SUMO	16.875,29	1.548,82	–15.326,47	6.857,60

* Ĉe stokvaloro estas kalkulitaj nur la produktokostoj, ne la vendoprezo.

DONACOJ AL FONDAĴO SZERDAHELYI

Sumo en la antaŭa periodo:	SEK 1.356,37
D. Luesken-Burger, Nederlando	80,50
Michel Duc Goninaz, Francio	50,00
Anonimulo	2.000,00
SUMO ĜIS MAJO 1990:	3.486,87

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon!

Forlasis nin Audrey Childs-Mee

Antaŭ kelkaj semajnoj forpasis post longa kaj doloriga malsano la ĝenerala sekretario de ILEI, sinjorino Audrey Childs–Mee. Ni perdis sindoneman, aktivan kaj afablan kolegon kaj talentan Cseh-instruistinon.

En venonta numero de *IPR* ni pli amplekse memorigos ŝin.

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino	: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio	: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio	: Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilo	: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio	: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio	: Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio	: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio	: Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Finnlando	: Synnöve Mynttinen, Pursimiehenkatu 12 B 46, SF-00150 Helsinki
Francio	: Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio	: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R.	: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 138, DDR-2722 Brüel
Hispanio	: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario:	: Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo	: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio	: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio	: Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio	: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp.	: Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko	: Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegio	: Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Portugalio	: Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino	: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio	: Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko	: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando	: Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo	: Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio	: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende Tel. (059) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle Tel. (071) 43.62.05

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESCO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuajoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.